MONATA ORGANO DE OOMOTO KAJ U. H. A. ★

Oomoto

1961

Marto-Aprilo

23-a Jaro N-ro 249-250 Administracio: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo.
Abonprezo: ¥ 240 por unu jaro; $ 0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando: Abonebla ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando

Por la ĝenerala malarmado de la mondo

UHA lanĉis kampanjon por kolektado de subskriboj

La eksterordinara kunveno de la Konsilantaro de la Universala Homama Asocio (UHA), kiu okazis ĉe la Oomoto-Centro la 21-an de marto 1961, unuanime decidis lanĉi tutlandan kampanjon veki la publikon, kaj kolekti subskribojn, por efektivigo de la ĝenerala malarmado de ĉiuj nacioj de la mondo. Por la kampanjo ĉiuj membroj de UHA kaj Oomoto tra la lando estas mobilizitaj dum unu monato de 15 aprilo ĝis 15 majo, sed la movado kulminos en la 3-a de majo, Memortago de la Japana Konstitucio. La subskriboj estos kolektitaj rekte el individuaj personoj surstrataj aŭ po-domaj kaj pere de kolektivaj grupoj.

La torĉon de niaj ideoj por la ĝenerela senarmigo al la mondo kaj pri la grava signifo de nia kampanjo disportas UHA per sia preskampanjo. UHA eldonis pri tio specialan numeron de sia ĵurnalo ZAS (*Zinrui Aizen Sinbun*), kiu en mez-aprilo jam ĝisiris ĉiujn angulojn de la lando. La alvokilo por subskriboj estis presita je pli ol miliono da ekzempleroj. Ĝia teksto estas jena:

"Por vivi en la Nova Epoko la homaro aspiras novan ordon de la mondo. Sed la aktuala situacio de la mondo estas tia, ke ni ankoraŭ vivas kun diversaj problemoj kaj sub minaco de milito, kiuj ĉiuj baras la plenumiĝon de nia aspiro. Por ke ni venku ilin kaj malfermu al ni la luman horizonton de la estonta mondo sen milito, necesas antaŭ ĉio, ke la fundementaj rajtoj de la homoj, kiel la filoj de Dio, estu respektataj kaj ĉiuj homoj sur la tero estu plene liberigitaj de malegala traktado. Precipe, nia epoko estas tiu de la spac-raketoj, kaj por ke la homaro estu liberigita de la timo je la teruraj armiloj kiel atomaj kaj hidrogenaj

La Fajra Ondo de la Amo

Dio komencis jam la rekonstruon de la mondo. Ĝis nun la anĝeloj regis la mondon, sed nun Dio mem per sia Spirito regas la mondon kaj la Dia Volo estas la granda leĝo, kiu laboras sur la tero. Ve al tiu, kiu ne obeas Lian Volon. Unue Dio parolis al la homoj per la spiritoj, poste — per la anĝeloj, pli poste — per sia filo kaj plej poste Li mem ekparolos al ili. Dio en sia dinamika manifestiĝo venas hodiaŭ por savi la homaron. Dio venas per fajro purigi la teron, doni novajn korpojn al la homoj, enporti amon en iliajn korojn, lumigi iliajn mensojn, liberigi iliajn animojn. Dio venas en la mondon por enmeti ordon, justecon, harmonion. *En nia epoko venas granda fajra ondo de la amo, kiu purigos la mondon, degelos la glaciojn de la egoismo persona kaj nacia.* Viaj domoj konstruitaj sur glacio disfendiĝos, falos kaj vi komencos droni. *Vi devas ŝanĝi vian vivon.* Se vi malfruos, vi baldaŭ troviĝos en la profundaĵoj de la maro. Kiam venos la komunistoj, ili forprenos viajn domojn, vian privatan posedaĵon.

Kial? Ĉar la kristanaj popoloj ne plenumis la Dian Volon dum 2000 jaroj. Se vi deziras vivi en harmonio kun Dio de la Amo, vi devas rifuzi la privatan posedaĵon. La plej

---

bomboj, la totala malarmado de ĉiuj nacioj estas urĝa bezono.

"Kiam la mondo staras en la vere grava krizo, ni japanoj havas la unikan Konstitucion, kiu devas montri la vojon de la morgaŭa mondo kaj kiu devas lumi kiel ora monumento en la historio de la homaro. Vivi la vivon de lumo kaj abundo, kreotaj sur la bazo de la pacspirito de nia Konstitucio, estas ne nur la devo, sed la misio, kiun ni japanoj devas plenumi por la bono de la tuta mondo.

"Ni volas, ke nia aspiro flugu al ĉiuj homfratoj de la mondo kaj apelu ilian konsciencon por la efektivigo de la senprokrasta abolo de ĉiuj armadoj. Jen kial ni petas vian kunlaboron per viaj subskriboj."

La tuta dokumentaro de la kampanjo de UHA, inklude la Petskribon kaj la Libron de Subskriboj por la efektivigo de la ĝenerala malarmado, poste estos sendita al la Japana Registaro, la Organizo de l' Unuiĝintaj Nacioj ktp.

Kun espero, ke la voĉo de nia alvoko ĉiam pli kaj pli disvastiĝos ĝis ĝi baldaŭ kovros la tutan terglobon por la fina venko de nia kampanjo.

La Redakcio

grandaj malbonoj kaj maljustecoj en la mondo estiĝas pro la privata posedaĵo, pro egoismo. Se la nuntempaj kristanaj popoloj ne rifuzos sian grandan egoismon, se ili ne plenumos la Dian Volon, se ili ne interpaciĝos, ili trapasos tra grandaj elprovoj kaj suferoj: tertremoj, inundoj, ciklonoj, militoj, revolucioj, ktp. La negativaj, egoistaj pensoj, sentoj kaj agoj de la homoj influas al la tero tiel, kiel la eksplozivoj.

Nun estas fino de unu malnova kulturo kaj komenco de la nova kulturo. Nun estas juĝo de la homoj kaj popoloj, oni likvidas la malnovan epokon; la leĝo de la justeco, la karmo agas tre rapide kaj redonas al ĉiu, kion li semis.

Venas unu granda balailo, kaj balaos ĉion. Rusujo provas jam la rezultojn de tio, kio venas. Kaj ĉiuj popoloj de la tuta mondo provos la samon. La kompreno ĉu estas Dio aŭ ne, ĉu ekzistas justeco aŭ ne. Ĉiuj malnovaj kredoj kaj eklezioj, mensogoj kaj eraroj pereos. La homaro bezonas novan sociordon. *Nur la amo nin savos.* Dio, la Amo estas nia Patro kaj ni estas gefratoj. Nun la homaro troviĝas antaŭ unu epoko de grandaj ŝanĝoj kaj radikalaj reformoj, kiuj alportos la novan kulturon de la frateco. Por ĉiuj homoj kaj popoloj venas plej favoraj kondiĉoj de vivo kaj evoluo en justeco, paco, ĝojo kaj libero. *La Dia Regno venas sur la teron.*

Novaj fortoj kaj energioj laboras kiel en la mondo, tiel ankaŭ en la tuta naturo. La Dia Plano estas jam en realiĝo. La grandaj suferoj estas signo, ke la nova kulturo naskiĝas en la mensoj, en la koroj, en la animoj. La kolektiva, la kosma konscio revekiĝas kaj la homoj ekkonos ke ili estas radioj de unu Suno de la vivo kaj ĉiuj popoloj estas membroj de unu familio — la homaro.

Do, ĉiuj devas esti liberaj kaj feliĉaj.

Trad. *P. G. Pamporov*
(Universala Blanka Frataro)

Baldaŭ aperos

La Zamenhofa Esperanto

(Simpozio pri -ata/-ita)

ĉ. 250-paĝa volumo kun kontribuaĵoj de elstaraj zamenhofanaj esperantologoj: S. La Colla, K. Kalocsay, I. Lapenna, T. Mikami, H. A. de Hoog, T. Pumpr, G. Waringhien, E. Sonnenfeld, R. Schwartz

STAFETO

Eld. J. Régulo, La Laguno, Tenerife,
Kanariaj Insuloj

Eterna paco ne estas konstruebla
sur la mizero de multaj homoj :

Afrika-Aziaj Verkistoj kunvenis en Tokio

por libereco kaj sendependeco de A-A popoloj

Por krei 'idealan' liberecon kaj sendependecon de diversaj afrikaj kaj aziaj landoj, afrika-aziaj verkistoj kunsidis por la tritaga konferenco, 28—30 marto 1961, ĉe la Sankei Internacia Halo en Tokio.

Partoprenis ĝin ĉ. 80 delegitoj de 6 afrikaj kaj 12 aziaj landoj (kelkaj el kiuj ankoraŭ ne estas sendependaj), inklude la japanan delegacion konsistantan el 26 poetoj kaj novelistoj junaj kaj maljunaj. La delegitoj de diversaj landoj inkluzivis: R. D. Senanayake, ĝenerala sekretario de la centra oficejo de la Buroo de Afrika-Aziaj Verkistoj en Cejlono, Konstantin Simonov, renoma novelisto el Sovetujo, S.E.D. Mursi, verkisto el la Unuiĝinta Araba Respubliko, ktp. Inter la partoprenintaj landoj estis Kongo kaj Laoso, kiuj nun estas la fokuso de tutmonda atento en la mezo de streĉita internacia situacio. La konferenco okazis sen ia helpo de registaro, sed sub la aŭspicio de pli ol 50 japanaj diversaj demokrataj kaj kulturaj organizaĵoj.

La kongreso komenciĝis per la kanto, "La sun' leviĝas — por la estonteco de Azio kaj Afriko", kantata de la Tokia grupo de miksita ĥoro. Sekvis la malferma parolado de Tatuzo Isikawa, japana novelisto kaj la prezidanto de la Tokia konferenco. Li diris interalie : "La afrika-aziaj landoj unuecigas ĉiujn siajn fortojn por forskui sin de tutaj imperiistaj jugoj kaj gajni plenan sendependecon kaj liberecon de la popoloj. Tio estas la korkrio de la dumil milionoj da homoj en Afriko kaj Azio, kaj ĝin subpremi jam povas neniu forto de la mondo".

Ĉe la ĝenerala kunsido oni diskutis pri la temo : "La aktuala situacio en la afrika-azia kontinentoj kaj misio de la verkistoj". Unu fakkunsido pritraktis : "Sendependeco de la nacioj por mondpaco kaj la problemo de imperiismo, koloniismo kaj militbazoj de fremdaj potencoj" ; la dua : "Naciaj kulturoj kaj ties interŝanĝado" ; la tria : "Parol- kaj preslibereco, kaj persekutado suferata de verkistoj".

S-ino M. E. Moumier, redaktoro de "Virinoj de Kameruno" kaj vidvino de la mortigita ŝtatviro de Kameruno, diris al la kunsido, ke ŝia lando ankoraŭ ne estas sendependa, ĉar tie daŭras bataloj, mortigoj kaj murdoj.

Aaron Tolen, alia delegito el

Kameruno, edukita en Parizo, diris, ke ĉ. 65 elcentoj de la popolo estas analfabetoj, kaj ke la registaro naciigis la radio-servojn kaj metis ilin sub strikta kontrolo.

Sigeru Nakano, reprezentanto de la japana delegacio, emfazis la gravan signifon de la Tokia konferenco por la antaŭenpuŝo de la kampanjo por sendependeco de ĉiuj afrika-aziaj landoj kaj popoloj.

Ahmed Kheir, delegito el Sudano kaj unu el la sekretarioj de la Buroo de Afrika-Aziaj Verkistoj akcentis, ke granda nombro da afrikanoj sukcesis akiri sian politikan sendependecon post multegaj oferoj. La luktado de la afrikaj popoloj ne nur disŝiris la ŝtalan kurtenon, kiun imperiistoj kaj koloniistoj starigis dum jarcentoj, sed devigis Eŭropon kaj Amerikon resti jam silentaj pri la internaj aferoj de Afriko. Ni verkistoj, egale ĉu japanaj, ĉinaj, hindaj, kamerunaj ktp, ne povas fermadi niajn okulojn antaŭ la realeco. Ni ne forgesu la fakton, ke ili (ĉiuj imperiistoj) preparas sin por nova milito per plivastigo de siaj militbazoj".

Suleiman Malik el Zanzibaro asertis: "En la nuntempaj cirkonstancoj en Afriko kaj Azio, ni memoru ke ĉiuj niaj verkaĵoj, rakontetoj, poemoj, noveloj, ĵurnal- kaj gazetartikoloj, devas plenumi du celojn: 1) batali por nacia sendependeco, kaj 2) gvidi la pli malfacilan taskon de nacia rekonstruado. Nur tiamaniere ni povos krei vere progreseman socion bazitan sur libereco". Li ankaŭ akuzis la okcidentajn politikojn, kiuj kaŭzas senĉesan ĥaoson en Afriko: "Usono starigis militbazojn por protekti la interesojn de la grandaj monopolaj konzernoj, kiuj investis en Afriko," kaj "Okcidenta Germanujo estas pli danĝera ol iu alia, ĉar ĝi helpas la koloniismajn fortojn por subpremi la liberigajn movadojn kaj agadojn tra la afrikaj landoj. Se ni analizos la situacion por nia solidareco kaj sendependeco, ni povas facile rimarki la gravan rolon, kiun nia Buroo de Afrika-Aziaj Verkistoj ludas por paco kaj sendependeco".

Aliaj parolantoj estis U. Thein

Tokia Konferenco de A-A Verkistoj

el Birmo, R. Apin el Indonezio, S.E.D. Mursi el la Unuiĝinta Araba Respubliko, kaj G. Musrepov el Sovetujo.

Ĉe la lasttaga sesio, oni prezentis la rezolucion de la konferenco kaj ĝin per unuanima aklamado akceptis por proklami al la tuta mondo. Kelkaj ĉefpunktoj de la rezolucio, publikigita en formo de "komunikaĵo" estas jenaj:

"La luktado de la afrika-aziaj popoloj kontraŭ imperiismo-koloniismo kaj por nacia sendependeco, demokratio kaj paco atingis senprecedencan apogeon. Ni ĉiuj tutkore subtenas tiun ĉi luktadon. Ni gajnas venkon post venkon, tagon post tago.

"La imperiistoj kaj koloniistoj, precipe de Usono, pliintensigas sian agresan manovron en Alĝerio per NATO, en Kongo per UNO, en la araba mondo per Israelo, por la celo forrabi al tiuj landoj sendependecon kaj eternigi sian imperiisman superregadon.

"Ni kondamnas la intensigon de la agresaj fortoj de usonaj imperiistoj en Laoso, kaj ni deziras la senprokrastan kunvokon de la 14-nacia konferenco por paca kaj efektiva solvo de la Laosa problemo.

"Ni tutkore simpatias kaj subtenas la deziron de la popoloj de Koreujo kaj Vetnamo por atingi la pacan unueciĝon de siaj landoj, kiuj estas maljuste dividitaj de la imperiistoj de Usono.

"La Buroo (en Cejlono)" mobilizos ĉiujn verkistojn de Azio kaj Afriko en sia sistema kaj metoda kampanjo por forviŝi imperiismon, koloniismon kaj rasismon de ĉiuj formoj".

La rezolucio en drasta tono manifestas la fortan kontraŭstaron kaj senarmilan batalon kontraŭ la koloniismo, ekspansiismo je militbazoj kaj -instalaĵoj, militaliancoj kaj land-divida regado en la vasta mondareo de la ekstrema oriento ĝis la okcidentaj bordoj de la afrika kontinento. Pri tio, poste komentis Tomozi Abe, japana novelisto kaj ĉefo de la japana delegacio, en sia artikolo publikigita en Asahi-ĵurnalo (2/aprilo): "Se oni kondamnas ĝin 'politika', mi respondas ke jes. Tamen, ĝi estas 'politika' nur kiel la voĉo por defendi la respekton kaj dignon de la homa vivo elmetata sub la ekstrema minaco. Ĝin jam povas subpremi neniu forto de la mondo, kiel diris s-ro Isikawa en sia malferma parolado. Se aŭskulti tiun voĉon simpatie estus io 'politika' kaj se kontraŭi ĝin aŭ resti indiferenta al ĝi estus io 'literatura', mi eĉ volonte rezignus esti 'literatura'."

La nuna konferenco estas la kvara. La afrika-aziaj verkistoj kunvenis unue en Nov-Delho en 1956, due en Taŝkento en 1958 kaj trie en Kolombo frue en tiu ĉi jaro. Ili denove kunvenos en Kairo en la aŭtuno de la kuranta jaro.

Luktado en Afriko

La luktado por sendependeco en Afriko okazas ne nur dum la lastaj kelkaj jaroj; ĝi jam daŭras de la unua momento, kiam blankuloj enpenetris tiun riĉan, junan kontinenton. La teknika kaj klera supereco de la blankuloj plifaciligis iliajn vivkondiĉojn tie kaj ili volis eternigi sian avantaĝon kiel konstantan privilegion. Sed iom post iom kelkaj afrikanoj mem studis kaj perfektiĝis por poste montri al siaj propraj gentoj, ke la "helpo" de multaj parazitemaj eŭropanoj estas tro multekosta.

Mi mem vivis sufiĉe longe inter tre malsamaj afrikanaj gentoj kaj rimarkis, ke ili ĝenerale estas pli bonkoraj ol eŭropanoj. Nur stulta antaŭjuĝo kaj malica malhelpemo de aro da ĉiam arogaj homoj klopodas subjugigi la naturan egalrajton de la koloruloj, kiuj, pro tio kompreneble, malamikiĝas al ĉiuj blankuloj.

Antaŭ sep jaroj mi faris tute sola ekspedicion tra Afriko per aŭtomobilo. Survoje mi ĉiam spertis la bonkoran helpemon de la koloruloj. Nur iu koloniema eŭropana registaro en Sudafriko rifuzis al mi la vizon, arestis kaj malliberigis min dum 97 tagoj, kaj traktis min ofte malpli bone ol hundon. Jam la suspekto pri ebla simpatio kaj kompato de iu blankulo kun koloruloj tute sufiĉas por ke la blankulaj parazitaj registaroj en Afriko traktu tiun blankulon kiel krimulon. El tio sekvas, ke la ekspluatistoj de Afriko nur pretekstas la diverskolorecon por protekti siajn rajtojn. Vere ili estas la konstantaj krimuloj kontraŭ ĉiuj homrajtoj.

Forte mi kredas, ke tiu malbonaĵo baldaŭ pereos kaj ne plu baros la vojon al harmonia tutmonda evoluo. Dum tre longa tempo perdis Eŭropo ĉiun rajton juĝi pri iu kontraŭ-blankula agado en Afriko; ĉar la krimoj de la ekspluatistoj mem estas jam tro multaj.

Neniam okazis politika donaco al homoj, kiuj ĉiam devas forte lukti por ricevi kaj konservi la propran rajteton kontraŭ parazitaj anakronismaj privilegiuloj. *Nur firma senperforta tutmonda solidareco povos efektive ekstermi la maljustaĵojn kontraŭ la naturaj kaj leĝaj homrajtoj.* Ĉiu havas respondecon por ĉiu alia. Sekve, ĉiu penskapabla loĝanto de la mondo plimalpli kulpas pri malbonaĵoj en Kongo. Neniu registara potenco povas perforti la popolamason, se ekzistas vera solidareco tra la tuta mondo. Scianta tion, oni bone komprenas, kial la mondunuiga facila neŭtrala lingvo Esperanto ne trovas sinceran kaj decidan subtenon eĉ de unu registaro de la tuta mondo. Vere interfratiĝu kun viaj samsortanoj kaj helpu krei senkriman novan mondordon, en kiu la homrajtoj estos pli valoraj ol peco da papero.

H. Ph. Gunkel

Nacia lingvo de Nigerujo

EPS informas, ke Usono "sekrete" negocas kun Nigerujo ekspedi la unuan *Pac-Korpuson* al tiu plej dense loĝata lando en Afriko. Se la Nigeraj oficistoj akceptos la proponon, Usono sendos Pac-Korpuson de 5,200 instruistoj, gvidantoj kaj teknikistoj por "batali analfabetecon kaj malriĉecon" en tiu nov-sendependa nacio.

Laŭ la proponata kvinjara plano, efektivigota per $ 110-milionoj, la unuaj

400 anoj de la Pac-Korpuso — ĉiuj instruistoj de la Angla — iros al Nigerujo en oktobro por esti pretaj komenci la lernojaron de 1962. La Pac-Korpuso dum la unua jaro de sia aktiveco en Nigerujo estos pligrandigita ĝis la nombro de 1,200 kaj 5,200 ĝis la mezo de 1963 por resti tiel same tra 1966.

La ĉefa celo de la Pac-Korpusa programo estas "helpi Nigerujon preni la rolon de gvidanteco inter la novsendependaj Afrikaj regnoj".

La akcepto de tiu propono estos anoncita en aprilo post la Usona-Nigera negoco kaj Usona parlamenta aprovo je la leĝfaro por organizi la Pac-Korpuson. La Korpuso nun estas preparata sub direktivo de la Prezidanto.

Tiuj kaj aliaj detaloj de la unua Pac-Korpusa programo por eksterlandaj agadoj estas donitaj en la memorando titolita "Proponoj de Pac-Korpusa Programo por Nigerujo". Ĝi estis preparita de Direktoro Sargent Shriver, kiu notas, ke "la sekvantaj proponoj estas faritaj por esplorado kun la Nigera registaro:

"1. *Angla lingvo.* Kelkmil Pac-Korpusanoj instruos la Anglan en la elementaj lernejoj sub rekta gvido de la Pac-Korpuso.

"2. *Mezlerneja instruado.* Kvindek ĝis cent kompetentaj mezlernejaj instruistoj, ĉefe en scienco kaj tekniko, faros regulan instruadon en Nigeraj mezlernejoj laŭ universitataj kontraktoj.

"3. *Industria disvolviĝo.* 105 Pac-Korpusanoj, kiuj finis la kursojn ĉefe industrian kaj teknikan, laboras en la servoj de Nigera industria esploro, ekspansio kaj merkatado".

EPS informas ankaŭ, ke "la Nigeraj oficistoj kaj la publiko anticipas, ke la Usona Pac-Korpuso donos grandan helpon por la disvolviĝo en Nigerujo," kaj ke "la ĝenerala gubernatoro, d-ro Azikiwe jam faris personan propeton".

La tuta programo de Usono ŝajnas bazita sur la *new frontier spirit.* Kio koncernas nin esperantistojn, tio tamen ne estas la politikaj kaj ekonomiaj aspektoj de la programo, sed la fakto, ke oni elektis la Anglan kiel la Nigeran *nacian* lingvon, ĉar "ĝi havas unuecigan efikan povon". Ni ĉiuj serioze pripensu tiun ĉi problemon.

N. Ogawa



Germana s-ano A.Ph. Gunkel vizitis la Oomoto-Centron

La 8-an de marto la Oomoto-centron en Kameoka vizitis germana samideano, s-ro A. Ph. Gunkel. Forlasinte jam antaŭ unu kaj duona jaroj la hejmlandon de Germanujo, li restis en Israelo ĉ. unu jaron. Lia celo estas servadi por la aktivigo de la esp-movado en la landoj, kiujn li trapasas, kaj kolekti ĉie laŭeble multajn markojn de homaj manplatoj por sia psikologia studo. Li restis ĉe la Centro 9 tagojn ĝis la 16-a kaj intertempe li veturis al Ajabe, Kioto kaj Oocu kun akompano de oomotanaj kaj aliaj esp-istoj. Trifoje li vizitis la hejmon de nia redaktoro, s-ro T. Nakamura, en Kioto. La 15-an vespere li havis okazon ĉeesti la monatan feston de Oomoto kaj faris paroladeton, per kiu li omaĝis kaj kuraĝigis la oomotanojn al plua aktivado por mondpaco. Antaŭ ol reiri al sia hejmlando li intencas viziti Indonezion, Aŭstralion kaj, se eble, Usonon. Bonvojaĝon al nia kara mondvojaĝanto! Kaj ĝis la revido okaze de la Universala Kongreso en Japanujo!

D-ro Balla Ignác (Budapest)

Rememoro pri la militkaptiteco en Siberio

Somere, en jaro 1914 eksplodis bombo en Serbio*. Fariĝis la aero pulva. Post unu monato aperis murafiŝoj en la tiama Aŭstra-Hungara monarkio. La mobilizadaj murafiŝoj alvokis la junularon: Soldatiĝu tuj, ĉar danĝero minacas la patrujon!

Adiaŭinte al la benkoj en la universitato, nevole mi devis soldatiĝi. Mi batalis en diversaj batalkampoj kontraŭ la nekonata "malamiko" ĝis mi fine en la jaro 1917 militkaptitiĝis en la rusa fronto. Kunkolektiĝis en la siberia militkaptitejo Pervaja-Rjeĉka apud Uladivostoko multaj jam persone konataj kaj nekonataj pacbatalantaj esperantistoj — inter ili la nuna "Paĉjo" en Esperantujo: Julio Baghy — kiuj decidis kontinue batali per nia paca ilo, por plibonigi la homaron, por krei pacon en la tuta freneziĝinta mondo kaj ekzili eterne la stultan militon, kiu alportas al la homaro nur mizerojn, mankohavojn kaj suferojn.

Nia "pacpalaco" estis japana militŝipo, kiu ankris ĉe Uladivostoko kaj kies kapitano estis la neniam forgesebla s-ro "Oba". Ho, kiomfoje ni pridiskutis diversajn aferojn, kaj fine ni forlasis la ŝipon kun tiu firma kaj sankta konvinkiĝo, ke ne ŝparante penadon, ni certe sukcesos aliformigi la frenezan mondon, ĉesigi aŭ eĉ ekstermi por ĉiam la senracian, sencelan malamon kaj malamikecon inter la diversaj nacioj, rasoj kaj homoj!

En jaro 1921 ni hejmenrevenis per ŝipo, kiu albordiĝis en la japana havenurbo Nagasaki, kie ni restadis tutan tagon. Japanaj fratoj riĉe gastigis nin en urba gastejo kaj superŝutis nin kun diversaj donacetoj.

Se mi nun laŭ la 40-jara perspektivo rememoras la ridetan vizaĝon de la tiam volonte kaj ĝoje kontribuantaj homfratoj, mi kortuŝiĝas de la emocio; al mi kun blankaj haroj elfluas larmoj.

Ankaŭ de ili, de niaj bonfarantoj ni adiaŭis kun peza koro, sed kun la konvinkiĝo, ke per nia interkomprenigilo, per nia kara lingvo kaj adorata tuthoma ideo ni sukcesos ekstermi la sangan militon el la vojo de la homara feliĉo.

Kaj jen, kio okazis post 25 jaroj?! En la jaro 1946 atombombo detruis la belegan urbon: Nagasaki, kaj la karbiĝintaj ruinaĵoj entombigis niajn tiujn fratojn, kiuj obstine persistis la pacan kunvivon.

Fine, antaŭ dek monatoj, korpremate, mi rigardis en Budapest la korŝire tragikan katastrofon, prezentitan per lumbildoj de nia eminenta, simpatia kaj nelacigebla s-ro Eizo Itoo. Mia ekkonatiĝo kun li estis por mi feliĉo, kurioza ĝuo, plezuro.

Gefratoj en la tuta mondo, ni rememoru kaj bedaŭru la malfeliĉojn, kompatindajn viktimojn, sed ne lamentadu.

Ne malesperiĝu! Ek la kapon!! Mateniĝas jam nia tago!!!

"Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante,
ni iru la vojon celitan,
.....
L' espero, l' obstino kaj la pacienco,
Jen estas la signoj per kies potenco,
Ni paŝo post paŝo post longa laboro,
Atingos la celon en gloro."

* Parto de la nuna Jugoslavio

Teruo Mikami

Parto II: Opinio pri la **ata-ita** Problemo

Legante HEROLDON pri "La kompleksaj verboformoj"

(*Daŭrigo de la antaŭa numero*)

Kio estas la estanteco, estinteco kaj estonteco? Pri la nocio de tempo mi ne scias pli bone ol iu alia, ekz-e, kion diris Schopenhauer kaj Einstein. Ni tamen ne bezonas ĉi tie filozofian aŭ sciencan difinojn. Sufiĉas diri, ke ili estas la tri tempo-dividoj, kiujn ni nomas tiel, rigardante ilin el unu fiksita punkto nuntempeca, kie ni *nun* staras. Tial, eĉ se "la momento, pri kiu ni parolas" estas, ekz-e, *estinteco*, nia "okulo" restas ĉi tie en la nuntempo. Alie, la est*inteco*, est*anteco* aŭ est*onteco* perdas sian sencon. Tio jam montras, ke tiuj tri tempoj ne havas, nek povas havi, la saman karakteron rilate al nia "okulo". Por kompreni ilian karakteron ni bezonas iom da konsideroj pli psikologiaj ol "horloĝaj". Mi bone scias, ke atismo ege abomenas tiun vorton "psikologia" kiam temas pri gramatikaj aferoj, sed ĝi lerte faras multan psikologian klarigon per figuroj kaj komparoj; same kiel ĝi, malŝatante la "aspekton" de la esperantaj verboj, tamen uzadas la esprimojn: "plenumiĝo", "nefiniteco", ktp. Kial do ni ne uzu ilin?

Mi povas diri, ke la nuntempo estas io *vidata*; ĝi do aspektas al ni kiel io ebena aŭ daŭranta pli ofte, ol ia sekunda punkto, kiun signus la tempo kiam ĝi pasas de la pasinteco en la estontecon. Male, la estinteco estas io *vidita* kaj la estonteco estas io *vidota*; ambaŭ do alprenas al si — rilate al nia "okulo" — la perspektivan aspekton de punkto, pli ofte ol de ebeno. Mi povas montri tion per la bildo:



(Noto: — Se oni preferas koncepti la tempofluon kiel senĉese turniĝantan cirklon, oni povas anstataŭigi per cirklo la trilateran linion. La rezulto estas la sama: la punkto de kontakto, kie la radio de nia "okulo" tanĝas la cirklon, estas la "aŭta" de la pasinteco unuflanke, kaj de la estonteco aliflanke.)

Ĉiu el la tri tempoj havas du aspektojn: unu estas *ebeno* (stato de ago-daŭro aŭ finiteco) kaj la alia estas *punkto* (okazmomento de ago). Laŭ la supra bildo ni povas kompreni, ke la ebeno de la estanteco estas plate videbla, sed punkto ne estas perceptebla (krom en esceptaj okazoj, pri kio mi tuj klarigos), dum la

ebeno de la pasinteco kaj estonteco kuŝas nevidebla, sed ambaŭ tempoj perceptiĝas ĉe punkto. Tiu punkto estas "okazmomento de ago", kies karaktero estas alia ol "agodaŭro" (-ata) aŭ "finiteco" (-ita), kiuj kuŝas sur la ebeno; tiu punkto ja estas *-ita* laŭ la aŭta funkcio. Kaj la sama bildo pravigas la jam faritan klarigon, ke, kvankam la plenumiĝo de agoj kun momenteca rezulto (-ita = -aŭta) okazas egale en la prezenco (responde al *-as*), preterito (responde al *-is*) kaj futuro (responde al *-os*), tamen ĝi okazas pli ofte en la preterito (*estis -ita*) kaj futuro (*estos -ita*), ol en la prezenco (*estas -ita*).

Aliflanke, la atisma tempo konsistas el tri egalmezuraj spacoj aŭ linioj — estinteco, estanteco kaj estonteco, kaj oni havas tri apartajn "okulojn" por observi ilin ne sialoke, sed ĉe *ilia* loko. El tio sekvas, ke la ago en ĉiuj tri tempoj prezentas sin al la respektiva "okulo" ĉiam kiel *ebenon*: -ata (ago-daŭro) aŭ -ita (finita stato), kaj nenie troviĝas *punkto*, kiu signus okazmomenton de ago, kaj sen kiu ĉiuj tri tempoj kuŝas sendependaj unu de l' alia. Mi povas montri tion per jena bildo:



Sed kiam temas pri la tri tempoj, ni devas ne forgesi la fakton, ke nia "okulo" restas ĉi tie en la nuntempo, kaj tial, eĉ se "la momento, pri kiu ni parolas" estas estinteco aŭ estonteco, nia "okulo" ne povas, nek devas, teleflugi kiel raketo sur la *ebenon* de aliaj tempoj. La sola permeso por tio estus la uzo de "historia prezenco", kiu tamen —oni atentu—havas karakteron pli retorikan aŭ stilistikan, ol gramatikan.

Nun ni revenu al la itisma bildo. En la prezenco, la ago okazas preskaŭ ĉiam sur la ebeno. Tial, "Mi fermas la pordon" fariĝas en pasivo: "La pordo estas fermata". Sed eĉ en la prezenco ni kelkfoje devas esprimi la okazmomenton de ago per -ita (= -aŭta), precipe kiam ni bezonas signi la momenton de unu ago samtempa al alia ago esprimita per la sama verbotempo. Ekz-e, mia pordo estas tiel farita (stato): "Kiam ĝi estas ĵetfermita, ĝi estas ŝlosita" (ne: -ata). En aktivo ĝi fariĝas: "Kiam oni ĵetfermas ĝin, ĝi ŝlosiĝas". En tiu ĉi ekz-o la okazmomento de ago estas — *enfokusita* por pruvi la aŭtan funkcion de -ita en la prezenco. Vidu la jam cititan en Enkonduko al Parto I: "Arbo havas esperon, se ĝi estas dehakita, ke ĝi ŝanĝiĝos", en kiu "dehakita" estas aŭta (= se oni dehakas ĝin). Tiu -ita nepre devas esti distingita disde la stata, kiel en

> Kaj ĉio, en pasio decidita,
> Forpasas, kiam la pasi' [estas] finita.
>
> (Hamleto, p. 88)

En ĝi la *fino* estas antaŭtempa al *estas* kaj *forpaso*.

Tiel duobla estas la funkcio de -ita: ago-rezulta kaj finita-stata. *Kaj la samo*

validas, kiel mi jam montris en Enkonduko al Parto I, *egale por la preterito kaj futuro*[9]. Tio faras nevalida la akuzon de atismo, ke "la 'aspektuloj' insistas pri tiu absurda sistemo nur ĉe la pasivo, kaj ankaŭ tie nur ĉe la pasivaj pasintecaj formoj, kaj eventuale ĉe estontecaj, sed tute ne ĉe la estantecaj" (n-ro 4 de Heroldo). En aktivo, ĉiuj kompleksaj formoj reduktiĝas, same kiel en atismo, al simplaj formoj, kun la sola diferenco, ke la plenekipa *simetrio* regas nur ĉe itismo: jen inter la kompleksaj formoj aktivaj kaj pasivaj kiel *stataj* tempoj, jen inter aktivaj -as, -is, -os kaj ties pasivaj ekvivalentoj. Nur se oni agnoskus la duoblan funkcion de -ita, same kiel oni praktike jam rekonas la duoblan funkcion de aktiva -is, tiam restus jam nenia problemo, pri kiu la esperantistoj devas fari "bruon" per senfina diskutado aŭ — polemikado. Malrekoni kaj maluzadi la aŭtan funkcion de -ita konsistigas "reformon" de la konjugacia sistemo de Esperanto.

*

Fine, ni iom vidu, kio estas la gramatika "logiko" de atismo.

1.

Ju pli mi legas la teorion de atismo, des pli mi volas enkonduki gramatikan terminon *tenso* por la gramatika "tempo", ĉar oni tro ofte konfuzas ĝin kun la horloĝa "tempo". Kvankam la tenso ne ekzistas aparte de la tempo en ordinara senco, tamen unu ne estas identa kun la alia. En n-ro 4 de Heroldo oni skribas: "Kio nun estas pasinteco (estas -ita), tio iam estis estanteco (estis -ata)". Tia difino temas pri eterna vero, kiel tio, kion ni diras, ekz-e, pri nia amiko mortinta: "Kiu estis vivanta, tiu estas mortinta"; sed ĝi havas preskaŭ nenian valoron el la vidpunkto de gramatika tenso.

Kio nun estas pasinteco, tio, el la vidpunkto de gramatika tenso, estas nenio alia ol *perfekta prezenco*.

Vd. (Hamleto diras:)

Mi vin salutas! (Rosenkranz kaj Güldenstern foriras)

Nun mi rest*is* sola. (p. 69)

Kial "rest*is*" anstataŭ "rest*as*" se temas pri la nuntempo? Simple ĉar, kio nun (*nun*) estas pasinteco (rest*is*), tio estas perfekta prezenco: Nun mi *estas* rest*inta* sola.

Vd. Kion mi skrib*is*, tion mi skrib*is*. (Johano, 19:22)

En tiu ĉi ekz-o *-is* estas perfekta prezenco. En la kompleksa formo: Kion mi estas skribinta, tion mi estas skribinta = Kio estas skribita de mi, tio estas skribita de mi. (Vd. vian nacilingvan Biblion.) Kaj ne: Kio *estis* skrib*ata*, tio *estas* skrib*ita*. Nek: Kio *estis* skrib*ata*, tio *estis* skri*bata*.

---

[9] Mi aldonas la ekz-ojn de aŭta en aliaj modoj:

1. Se vi povus ricevi lin kiel edzon, tiam vi estus bone prizorgita (= -aŭta). (Fabeloj 1, p. 28.)
2. Se iu batos homon kaj tiu mortos, li estu mortigita (= -aŭta). (Eliro, 21:16.)
3. Kaj se iu ŝtelas homon por vendi lin, aŭ oni trovas tiun en lia mano, li devas esti mortigita (= -aŭta). (Eliro, 21:12.)

2.

Ni jam vidis, ke laŭ atismo *-is* esprimas pasintecon sed ne finitecon, kaj laŭ la atisma "simetria" tabelo *-is* respondas al kompleksa *estis -anta* ĉe aktivo kaj *estis -ata* ĉe pasivo.

Sed en n-ro 10 (inter aliaj) de Heroldo oni diras: "La pasiva ekvivalento de -is estas jen *estis -ata* (ĝia kutima, ĉar plej proksima signifo), jen *estas -ita*, kaj jen *estis -ita*". Kiel do? Al la "pordo", kiu *estis* malferm*ita* povas okazi, ke ĝi *estis* ferm*ata* (responde al: oni ferm*is*); sed kiel povus okazi al tiu sama pordo, kiu *estis* ferm*ata* (kaj kiun la interveninta policano ja eĉ haltigis!), ke ĝi — sen finiteco de la fermo (-ata) — jam *estis* aŭ *estas* ferm*ita*? Vera miraklo!

Se ni itistoj diras, ke kelkfoje, *-is* = *estas -ita*, tio signifas du aferojn: 1) ni rekonas finitecon en *-is* kaj 2) ni rekonas la tenson de perfekta prezenco en *-is*: do, (en tiu ĉi okazo) *-is* estas identa kun *estas -ita* kiel perfekta prezenco. Kaj tiu formulo estas ebla nur ĉe itismo, kiu rigardas la is-tempon kun la "okulo" fiksita ĉi tie en la nuntempo.

Se atismo praktike rekonas la saman formulon (kiel suprecitite), ĝi devas unue pravigi sin teorie. Laŭ ĝi, *-is* estas *estis -ata*, kies gramatika tenso estas preterito, kaj *estas -ita* estas prezenco. Ambaŭ estas du apartaj tensoj. Ke la du frazoj: *la domo estis konstruata* kaj *la domo estas konstruita* estas tiel malsamaj kiel la nombroj "35 kaj 53", tion oni mem klarigas en n-ro 9 de Heroldo. Des pli, do, oni devas pravigi sin pri tio: Kial *-is* foje povas respondi al *estas -ita*? Ĉu ĝi, cetere, ne rompas la "simetriecon" de la bela tabelo? Ŝajnas, ke kion la teorio ne permesas, tion atismo facile permesas al si en la praktiko.

3.

"Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ *estis* mortig*ita* de neniu; unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis".

Pri tiu ĉi ekz-o el la Ekzercaro (§ 39/11), oni klarigas en n-ro 8 de Heroldo, ke "la dua frazoparto estas antaŭtempa al la unua, tial *-ita*" kaj daŭrigas, "logike ankaŭ *ne mortigis sin* devus esti *ne estis mortiginta sin*; sed en aktivo ja estas permesite anstataŭigi malsimplajn formojn per simplaj, se la senco restas klara". Jen oni denove konfuzas la gramatikan tenson kun la horloĝa tempo! Laŭ la Esperanto de Zamenhof, ĉiuj verboj en tiu ĉi ekz-o: "mortis", "mortigis", "estis mortigita" (= mortigaŭta) kaj "mortiĝis" estas gramatike samtempaj, t. e. ili egale indikas simplan pasintecon. Mi estas certa, ke eĉ anglalingvanoj, kiuj kutimas esprimi, ekz-e, "Li diris, ke li estis vidinta ŝin", tute ne tradukas angle la supran ekz-on laŭ la unika tempo-akordigo de atismo; ili tradukas ĝin ĝuste kiel ni itistoj: en *plain past* (simpla pasinteco). En aktivo, la samo devas teksti: Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li taman ne mortigis sin kaj ankaŭ neniu mortigis lin...".

Mi ne dubas, ke atistoj tradukos la faman frazon: *Vēnī, vidī, vīcī.*, same kiel ni itistoj, per "Mi venis, mi vidis, mi venkis". Sed ĉu ili dirus laŭ sia tempo-teorio, ke tio estas la "permesita" simpligo de "Mi estis estinta veninta, mi estis vidinta, mi venkis"? Evidente, la supra klarigo de Heroldo estas nur perforta

konformigo de sia apriora teorio al la donita ekz-o. Tio estas la grava eraro, kiun kaŭzas la fakto ke atismo atribuas al -ita nur antaŭtempan finitecon kaj ne la aŭtan funkcion, kaj kiu eĉ sola pruvas la maltaŭgecon de la atisma teorio por la konjugacio de Esperanto.

4.

En n-ro 16 de Heroldo ni legas, ke "la ekzemploj en la Fundamenta Ekzercaro pri la kompleksaj verboformoj estas tute korektaj laŭ la *tempa* sistemo". Pri la falseco de tia aserto ni jam vidis en 3, ĉi-supre. Kaj se, tie, la verboformo "*estis* mortig*ita*" jam pruviĝis, ke ĝi ne signas antaŭtempan finitecon laŭ la vidpunkto de gramatika tenso, la alternativo restas, ke oni vole-nevole devas rekoni en ĝi la "ĝemelon" de -ita, kiu estas aŭtentika laŭ la Fundamentaj (kaj aliaj) verkoj de Zamenhof.

Sub tia lumo ni nun revenu al la du formuloj jam konfrontitaj sur p. 29 de la antaŭa numero: estis -ita = iĝis -ita (itisma); kaj estis -ata = iĝis -ita (atisma).

La leganto, kredeble, jam bone scias, ke nia formulo signifas en efektiveco: estis -*aŭta* = iĝis -ita (kaj *ne*, kiel atismo trumpetas, ke ni esprimas *plenumiĝon* per *plenumiteco*). Do, nenia problemo ekzistas por itismo.

Kiel do pri la atisma formulo? Ni provizore konsentu, ke laŭ la "*tempa*" sistemo, "estis -ata" estas samsignifa kun "iĝis -ita". Sed "iĝis -ita" signifas plenumitiĝon kaj "estis -ata" signifas ankoraŭdaŭron. Evidente, unu kontraŭdiras la alian. Kion do fari, ekz-e, pri § 25/21 en la Ekzercaro:

"Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis jam longe konstruita".

Ĉu "*estis* konstru*ata*" en tiu ĉi ekz-o signas plenumitiĝon aŭ ankoraŭdaŭron? La distingo tute ne estas ebla, malsame kiel en la okazoj de itisma -ita. Jen la "problemo" restas ĉiam unuflanke por atismo. Cetere, oni devas konstati, ke ĉiuj pasivaj kunmetitaj formoj kaj ties fraz-ekzemploj en § 25 (1-25) de la Ekzercaro estas *stataj* tempoj, kiel la supre-citita: agodaŭra (-ata) kaj finita (-ita).

Mi sincere deziras admoni, ke oni neniam ripetu tian mallogikan formulon, kia: estis -ata = iĝis -ita; ĉar "kio *iam* estis estanteco (-ata)", tio *ne* tiam sammomente, sed nur en iu posta tempofazo povas esti: "iĝis -ita".

Sed nuligante tiun formulon, mi mem konstatas, ke tiu lasta formo *iĝis -ita*, se uzata ĝenerale, "eventuale povus solvi la problemon" por la "simetriuloj", kiuj ne disponas verban esprimilon por signi plenumitiĝon. Malgraŭ tio, mi "*ne* proponas la ĝeneralan uzadon de tiu ĉi formo", ĉar ni jam havas sufiĉan nombron da participaj "remiloj".

Eĉ se la Fundamentaj Ekzercaro kaj Gramatiko "*ne* havas ian regulon, eĉ ne mencion, pri *aspektoj*" (ja nek pri la *tempa* sistemo kiel tia!) la ekzemploj en ambaŭ verkoj pruvas, ke "la aspekta sistemo estas" ne nur "pli valora kaj oportuna", sed ankaŭ sole logika el la vidpunkto de gramatika tenso.

5.

En n-ro 4 de Heroldo oni skribas: "Ĉio, kio en iu momento *estis* (estas, estos) -*ota*, tio en iu posta momento unue *estis* (estas, estos) -*ata*, kaj nur post tiu ata-momento ĝi *estis* (estas, estos) -*ita*". Ni atentu, ke ĉi tie atismo agnoskas

ankaŭ posttempecon de -ita. Ni do opinius, ke al tiu regulo perfekte konformas la itisma ekz-o farita de Heroldo: "La krimulo *estis* persekut*ata* kaj arest*ita*". Kaj tamen, pri ĝi oni kondamnas en n-ro 16, dirante, "tio estas kompleta renverso de la normala ordo", kaj "se la 'aspektuloj' skribus: 'la krimulo estis persekutita kaj arestata', ili ja pli ĝuste sekvus la ordon". Ni atentu, ke ĉi tie oni jam insistas nur la antaŭtempecon de -ita, ĉar ĉi tie oni parolas el la vidpunkto de sia tempa teorio — laŭhorloĝa. Sed kia subita renverso de l' ordo! Mi demandas, kion do atismo celis diri per la supra regulo — korekta laŭ itismo. Ĉu ne tie oni diris, ke "feto" fariĝas "bebo" kaj "bebo" nur post la beb-tempo fariĝas "knabo"; kaj nun oni renversas la ordon, dirante: "knabo" devas ĉiam fariĝi "bebo"! Evidenta sinkontraŭdiro.

Samloke, atismo klarigas: "fakte ambaŭ agoj — la persekuto kaj la aresto — kuŝas en la *sama* ebeno. Korekte do estas skribi (laŭ atismo): 'la krimulo *estis* persekut*ata* kaj arest*ata*' aŭ, se temas pri antaŭtempeco: 'la krimulo *estis* persekut*ita* kaj arest*ita*' ". Jen nur alia pruvo de la tragika manko de ago-rezulta tempo, kion ni jam vidis kaj ĉe nia Tribunalo kaj per la grafikaĵo sur p. 43.

6.

1. Georgo Vaŝinton estis naskita la 22-an de feb.
2. La butiko estis malfermita je la 8-a.

Tiuj du itismaj frazoj fariĝas laŭ atismo:

1'. Georgo Vaŝinton estis naskata la 22-an de feb.
2'. La butiko estis malfermata ja la 8-a.

Tamen, pri tiuj kvar ekz-oj oni diras en n-ro 8 de Heroldo, ke ankaŭ 1 kaj 2 povas esti korektaj laŭ atismo, ĉar en 1, la nasko aŭ naskiĝo estis finita en tiu tago, kaj en 2, se la pordon oni jam fermis senpere antaŭ la 8-a. (La leganto rememoru la okazintaĵon ĉe la Tribunalo.) Evidenta alproksimiĝo por ŝtopi la breĉon,[10] kiun kaŭzis la eksigita "ĝemelo", ĉar "estis ata" kun nenia elemento de *finiteco* ne povas esti ekvivalenta al "iĝis -ita", kiu evidente signifas momentecan agorezulton. La pordo, kiu *estis* ferm*ata* (kaj kiun la policano eĉ povis haltigi dum ago-daŭro!) ne povas samtempe jam signifi: la pordo *iĝis fermita.*

Kaj samloke, oni demandas: "Laŭ itismo ĉiukaze devas esti -ita kaj nepre ne 'la butiko estis malfermata je la 8-a'; sed kiel oni diferencigu la agon (faron aŭ fariĝon) de la stato?"

---

[10] Pri tiu punkto mi povas prezenti atestanton, E. Sonnenfeld, kiu en sia letero al Heroldo (n-ro 17, 1959) skribas: (ekstraktite) "Mi konstatas, ke via vidpunkto rilate al tiuj kunmetaĵoj jam esence ŝanĝiĝis kaj alproksimiĝis al la vidpunkto *itisma* (per kiu kursivigita vorto mi — T. Mikami — anstataŭigis unu vorton). Efektive mi en Heroldo jam delonge ne rimarkis la uzon de 'estis -ata', kiam tutklare temas pri io jam finita. Tio tamen ne estis tiel en antaŭaj jaroj, nek ŝajnis al mi ke estis via opinio laŭ la korespondo inter ni ŝanĝita.

Al tiu atisma demando mi povas respondi:
En ĉiuj tensoj: la prezenco, preterito kaj futuro,
1) ni esprimas ago-daŭron per *-ata* kiel staton;
2) ni esprimas ago-rezulton per *-ita* laŭ la aŭta funkcio;
3) ni esprimas finitecon antaŭtempan aŭ posttempan per *-ita* kiel staton.
(Vidu la supran tabelon de itismo.)

Resume: Inter la aktivo kaj pasivo de kompleksaj verboformoj kiel *stataj* tempoj regas perfekta harmonio. Plie, al la aktivaj simplaj *-as*, *-is*, *-os* respondas la pasivo per *estas -ita*, *estis -ita*, *estos -ita* (laŭ la aŭta funkcio). Tio faras nevalida la akuzon de atismo: "Kial, laŭ la aspektuloj, ne validu por la aktivo la sama regulo kiel por la pasivo? Por tiu malsama traktado de la aktivo kaj pasivo ni ne vidas ian racian kialon" (n-ro 6 de Heroldo). Tiujn samajn vortojn mi redonas ĝuste al atismo, en kiu ne regas tia harmonio kia en itismo. Mi jam montris tion sufiĉe. Mankhava estas nur atismo.

7.

En n-ro 9 de Heroldo ni legas: "Laŭ la sana homa menso, se al 'mi kapt*as*' respondas 'mi *estas* kapt*ata*', al 'mi kapt*is*' normale devas respondi 'mi *estis* kapt*ata*', kaj al 'mi kapt*os*' devas respondi 'mi *estos* kapt*ata*' ".

Ne nur normale, sed absolute tio devas esti tiel ankaŭ laŭ la zamenhofa sistemo, kondiĉe ke tiuj pasivaj formoj estas *stataj* verboj.

Vd. Kio estis farata, tio estos farata. (Predikanto, 1:9)

Samloke, oni skribas: "Ni legas, ekz., ĉe Waringhien ("Lingvo kaj Vivo"), ke al aktiva 'mi kapt*as*' respondas pasiva 'mi *estas* kapt*ata*'; sed ke al 'mi kapt*is*' respondas ne 'mi *estis* kapt*ata*' sed 'mi *estis* kapt*ita*' ". Jen oni distordas la zamenhofan sistemon per sia apriora teorio, forgesante, ke la funkcio de *-is* estas duobla:

-is < A G O / STATO > -ita

Ni jam sufiĉe vidis, ke *-is* estas du-funkcia (ago kaj stato) kun kvar signifoj. Al "mi kapt*is*" povas respondi jen "mi *estas* kapt*ita*", jen "mi *estis* kapt*ata*", jen "mi *estis* kapt*ita*" (= -aŭta), jen "mi *estis* kapt*ita*" (finita stato).

Se tamen oni neniel povas rekoni la duoblan funkcion de *-ita* respektive *-is*, mi ne povas ne diagnozi, ke oni estas tre simila al tia kolorblindulo, kiu ne povas percepti certan specon de farbo, kaj ke, kiu obstine insistadas pri -ita nur antaŭtempecon, tiu ja estus hipermetropa.

Mia konkludo: Pli bone havi du sanajn okulojn ol unu nenormalan.

Kadó, kadó, jam temp' está!

DAŬRIGOTA per POSTNOTOJ

KOREKTO: En la antaŭa numero, p. 27, 12-a linio de sube, *sed* devis esti *tamen*.

Iŝmael Gomes Braga

Religiaj Profesiuloj

En la serio da tre respektindaj artikoloj de S-ro Sakae Kobajaŝi, aperantaj en "OOMOTO", venas gravaj temoj, kiujn ni devas atente studi kaj honeste diskuti.

En la numero de Nov-Dec 1960 ni legas ĉi tiujn liniojn:

"*En la ordinaraj tagoj ŝi* (— Matriarko Naohi Deguĉi) *estas simpla dommastrino, kiu plugas la kampojn kaj okupiĝas en ŝpinado kaj teksado*" (p. 164).

Pli poste li diras:

"*Ke Oomoto malgraŭ la sepdek-jara historio ne havas profesiajn misiistojn, tio faras karakterizon de tiu religio. Sed estas demando, ĉu tia karakterizo estos avantaĝa por la estonteco de Oomoto. El la kristana vidpunkto mi povas diri, ke la laika movado en kristanaj eklezioj havas signifon, nur kiam ĝi estas intime ligita kun la laborado de profesiaj misiistoj. Por ke la Oomotismo estu disvastigata, necesus, paralele kun la sistemigo de la doktrino, trejni profesiajn misiistojn, garantiante ilian vivtenadon kaj dissendi ilin al diversaj distriktoj. Oni bone notu la fakton, ke ekzistas certaj religioj, kiuj estas pli novaj kaj malpli fortaj en la doktrino ol Oomoto, kaj tamen akiradas ĉiam pli grandan nombron da sekvantoj per la laborado de profesiaj misiistoj*" (p. 166).

Ĉu la kristanaj eklezioj plenumis sian mision dum sia dumiljara regado en ĉiuj landoj de la Okcidento? Tute ne!! Ili perdis ĉian religian inspiron kaj fariĝis ekonomia forto tute kontraŭa al sia propra religia spirito.

Ilia historio estas plena de abomenindaj krimoj kontraŭ la homaro. Ni nur legu la Historion de la Inkvizicio, de la religiaj militoj; ni atentu la vivmanieron de la kristanaj popoloj, la novajn militojn de kristanaj regnoj kaj ni okcidentanoj vere hontos kaj abomenos tian historion de la "kristana" mondo.

Ĉu ne la profesiaj misiistoj pereigis la kristanan doktrinon per sia perfekta profesia organizado?

Sen ia dubo! Ili starigis ĉiopovan regmaŝinon, kiu superstaris la reĝojn kaj imperiestrojn; ilia nombro estis senlima; iliaj posedaĵoj estas pli grandaj ol tiu de ĉiuj regnoj; sed ĉio ĉi tio estas kontraŭa al la religia kaj socia celado de la Evangelio, t. e. de Kristanismo mem.

La profesiismo en la "kristanaj" eklezioj detruis Kristanismon kaj anstataŭigis ĝin per idolanismo. La riĉegaj kristanaj eklezioj estas la plej absoluta religia malsukceso de la Mondhistorio.

La vojo de Oomotanoj estas la sama de la brazilaj spiritistoj (ne de la Usonaj spiritistoj!): tute kontraŭa al la vojo de la religia profesiismo de la kristanaj eklezioj. Neniel gravas, ĉu nia nombro kreskas malrapide; ĝi konsistu nur kaj ĉiam el veraj kredantoj, kiuj laboras nur pro amo, neniam por akiri monon!

Benata estu Sinjorino Naohi Deguĉi, ĉar ŝi ne estas profesia religiulino, sed "simpla dommastrino, kiu plugas la kampojn kaj okupiĝas en ŝpinado kaj teksado".

Ju pli malforta ekonomie kaj politike des pli inspirata estas la homo por siaj religiaj devoj: Jesuo Kristo mem estis

La triobla devo prizorgi sian sanon

Eble kelkaj personoj surpriziĝos antaŭ la certigo, ke la prizorgo de la sano estas ĉies devo. Ili diros:

— Mi estas la mastro de mia propra korpo kaj mi rajtas fari el ĝi tion kion mi volas. Se mi volas prizorgi mian sanon, mi ĝin prizorgos; sed se mi ne volas, mi ne prizorgos ĝin kaj neniu rajtas entrudiĝi en miajn privatajn aferojn.

— Ne, mia kara amiko, vi tute eraras. La mastreco de via propra korpo ne estas absoluta, sed tre relativa; kaj vi tute ne rajtas fari el ĝi ĉion kion vi volas. Via opinio estis eble valida ĝis antaŭ nelonge, kiam la homaro ankoraŭ sin alkroĉis senespere al kadukaj formuloj, kiuj ĝin kondukis al nuna ĥaoso. Sed, feliĉe, tiu tempo estas baldaŭ mortonta kaj ni jam staras sur la sojlo de nova mondo kun nova homaro.

La tuj naskiĝonta homaro, kiu aktoros en la komenco de la tria jarmilo, havos klaran ideon pri la fundamentaj aferoj kiuj ĝin koncernos. Ĝi sin regos laŭ principoj de amo kaj racio kaj tute malakceptos la ĝisnunajn leĝojn de egoismo, nescio kaj perforto.

Se vi volas, do, esti avangarda homo de la nova epoko, forlasu pasintecajn ideojn kaj ekkomprenu, ke vi estas nur ĉelo de grandega vivanta organismo nomata homaro kaj, sekve, vi devas submetiĝi al ties komunaj naturaj leĝoj.

1) *Devo al vi mem.* — Se vi estas kredanto, vi devas akcepti, ke Dio donacis la vivon al vi kaj nur Li rajtas forpreni ĝin de vi. Vi, do, estas devigata skrupule ĝin prizorgi ekde via naskiĝo ĝis via lasta tago, evitante ĉiujn kaŭzojn de malsano kaj akcidento. Se vi ne estas kredanto, vi devas akcepti, ke la naturo donacis la vivon al vi por ke vi ĝin ĝuu plenplene respektante ĝiajn neŝanĝeblajn leĝojn. Vi estas nura administranto de via sano, kiun vi devas ĉiutage flegi kaj plikreskigi; sed kiun vi tute ne rajtas malpligrandigi. Samkiel honesta administranto severe respektas la proprumaĵon, kiun li administras, vi estas devigata saĝe administri la sanon, kiun vi ricevis de viaj gepatroj (tio estas, de la naturo) por ke vi povu siatempe heredigi ĝin al viaj idoj.

2) *Devo al viaj idoj.* — Se vi havas riĉaĵojn, vi povas ilin postlasi al viaj gefiloj. Se vi estas malriĉa homo, vi ja ne povas postlasi riĉaĵojn al ili. Tio ne gravas kaj mi celas nur fari komparon.

Se vi havas sanon, vi estas en bonaj kondiĉoj por generi sanan infanon.

---

pli malriĉa ol Matriarko Naohi Deguĉi. Li estis tiel malriĉa kiel Nao Deguĉi en sia karcero, kiam ŝi skribis la unuajn vortojn pri sia misio. Li estis tiel malforta kiel Onisabro dum la persekutado, kaj li restos eterna modelo de morala forto.

Morale li restos ĉiam nevenkebla.

La vojo de oomotanoj estas prava kaj tiu de la kristanaj eklezioj estas monstra eraro. La mondo trovu la oomotanojn naivaj, sed neniam monavidaj!

La Voĉo de Ameriko Disaŭdigis Intervjuon kun D-ro KAO

Pastro D-ro J. B. Se-Tsien Kao, O.F.M., Ĝenerala Vikario de Feng-siang (Ĉinujn) kaj Profesoro en la Fu-Jen-Universitato de Taipei (Insulo Taiwan, Formosa Ĉinujo) partoprenis en la Esperanto-programo de la Voĉo de Ameriko la 24-an de Marto 1961. Lin intervjuis D-ro William Solzbacher, estro de la Esperanto-programoj kaj membro de la Akademio de Esperanto. Malantaŭe staras kelkaj el la regulaj kunlaborantoj de la Esperanto-programoj de la Voĉo de Ameriko (de maldekstre): John Petraitis, parolisto; James Parisi, sonbendredaktoro; Clare Soponis (sekretariino de membro de la Usona Domo de Reprezentantoj), parolistino; Eve Cuthbert (programsekretariino en la Usona Ministerio de Sano, Eduko kaj Bonfarto), parolistino; Vincent Gugliotta, reĝisoro. La Voĉo de Ameriko ĝis nun disaŭdigis kvar seriojn de programoj en Esperanto por aŭskultantoj en ĉiuj partoj de la mondo, uzante sendilojn en Usono, Afriko kaj Azio.

Kontraŭe, se vi estas malsana, vi nur sukcesos naskigi malsanan estaĵon, kiu dum sia tuta malfeliĉa vivo estos kontraŭ vi kvazaŭ konstanta akuzanto.

Nu, ĉu vi kredas ke vi rajtas venigi al la mondo tiajn ulojn, kiuj poste en eterna suferado trakuros hospitalojn, sanatoriojn kaj azilojn por serĉi flegadon?

Ne sufiĉas diri: "Mi ne volas generi malsanulon nek malfeliĉulon. Mi arde deziras, ke mia filo estu sana kaj feliĉa kaj ke li ĝuu la vivon."

Se vi efektive tion deziras, vi devas vin mem prepari por ke tio realiĝu. Unue konsciu plene vian gravan respondecon antaŭ viaj idoj. Due vivu puran vivon respektante la neŝanĝeblajn naturajn leĝojn.

3) *Devo al la socio.* — Ni estas ĉiuj interdependaj en la socio. Se vi prizorgas vian sanon, vi bonfartas kaj povas ĉiutage labori en senĉesa produktado. Vi estas utila elemento al la socio kaj tiu ĉi povas esti dankema al vi.

Se vi ne prizorgas vian sanon, vi malbonfartas kaj ne plu povas efike labori. Vi devas konsulti kuraciston, kiu preskribos kuracilon al vi. Dume vi perdas horojn kaj eĉ tagojn kaj via ekonomia situacio suferas baton.

Se la malsano estas pli grava, vi devas tute ĉesi labori. Vi devas enlitiĝi, ĉu hejme ĉu en malsanulejo, kaj komenciĝas periodo de malabundo kaj eĉ de mizero aŭ malsato por via familio; escepte se vi apartenas al mutuala societo pri helpo aŭ se vi havas asekuron kontraŭ malsano. Sed eĉ en tiuj kazoj estiĝas maljusto, ĉar pro via malzorgo la aliaj anoj estas devigataj elspezi por vi la monon de siaj kotizoj. Kaj se temas pri ŝtata senpaga hospitalo, vi pagigas ĉiujn civitanojn, kiuj per siaj impostoj subtenas tiujn kuracejojn.

Resume kaj konklude: Ĉiu inteligenta, bonkora kaj honesta homo estas *devigata* prizorgi sian sanon antaŭ si mem, antaŭ siaj idoj kaj antaŭ la tuta socio.

La kanto de nostalgio*

SUZUKIDA Kyûkin

Ho, mia hejmoloko! Nun sunradie
surfac' de Semi-fluo tepidas tie,*
kaj kiam longas tag' kun printempa mildo,
sur branĉoj flirtas, pepas migranta birdo;
pilgrimas piulinoj el urbo fora
al ekvinoska festo kun paŝ' torpora;
kurantajn plekoglosojn en flu' ravina*
ĉe nasoj kaptas gaje jen grup' knabina
ebria de la gutoj de l' reto trempa,
ja kiel de sakeo en mez' printempa;
malhastas gejunuloj en rem-reveno
de monto kun sakuroj, de florfesteno,*
kaj ili flustras amon sub arba ombro,
komedianajn gestojn sen ĉes' sen nombro
jen tiel kaj ĉi tiel kun ŝerc' imitas,
en rond' senzorga, gaja, eksplode ridas.
Nu tien, kun mi, kara,
reiru nun jam para!

Ho, mia hejmoloko! Nun arb' kamfora
kun verda jun' aromas per flu' odora,
kaj folilarĝajn kverkojn en delikato
somero frua skuas per zefirado;
sub vojon de arbara sanktejo like
radias sun' tra branĉoj nun mozaike;
bovĉaro kun timonoj lakitaj glitas,
sendito de l' mikado al templ' rapidas
por preĝi la nasktagon de la mikado
kaj diojn adorkultos kun malv-kronado.
Nun gajas Gion-festo en tag' aprila:*
sur avenu' homsvarma sub sun' subira
kun halebardoj iras la festoĉaroj,
kaj meze de l' spektantoj sur trotuaroj,
*miksite kun la bonzoj el Hie-monto**
kaj floristinoj, iras en homa ondo.
Nu tien, kun mi, kara,
reiru nun jam para!

*Ho, mia hejmoloko! Folioj alnaj**
jam koloritaj flave flirtadas svarmaj;
jen pelas flavan bovon knabino rura
per kanto post rikolto de riz' matura.
Descendas suno, foren rigardon sian
direktas al naŭringa pagodo, tiam

silentas ĉio dorme, kadukaj arboj
foliojn lasas fali en vesperskarpoj,
simile al maljuna funebristino
kun la vual' en tedo, kun la kapklino,
malgaje sopiranta; kaj tra folioj
de arboj luno strabas per la radioj
kun sonĝaj la okuloj. Ho, ĉe l' vespera
sonoro pala kaptas la splen' anhela
la pilgrimantojn al la sanktejo,
sopire al la hejmo kun brusta veo.
Nu tien, kun mi, kara,
reiru nun jam para!

Ho, mia hejmoloko! Nun kuras krake
kaj dise la folioj aceraj sage
sur frida Kamp' Makuzu oktobra nube,
kaj jen amitabistoj-asketoj grupe
pilgrimas al Kioto en amikeco
post budaservo. Pasis jam la tagmezo,
aspekte kvazaŭ oni sur voj' erarus
sur la dekliv' vespera. Ĉu pluvo falus
sur sudon de Kioto? Ho, pluv' malvarmas
aŭtune, kaj pro l' spleno l' okuloj larmas
en tag' mallonga. Juna la budaisto
sopiras en krepusko ĉe leg-persisto
sur kara sutro ora kaj estimenda
al nia land' portita el lando fremda
en tempo tre antikva, aŭ ĉe la bildo
de Sankta la Budao kun rida mildo.
Nu tien, kun mi, kara,
reiru nun jam para!

NOTOJ DE LA TRADUKINTO:

1) La poemo estis versita sub la influo de 'Mignon' de Goethe, kiel unuavide oni rimarkas, sed ĝi restas juvelo de nia literaturo, ankoraŭ nun deklamata de multaj.
2) Semi: Alia nomo de Kamo, rivero en Kioto.
3) Plekogloso: Genro de fiŝo, Plecoglosus altivelis.
4) Sakuro: Japana ĉerizarbo, trovota en Plena Ilustrita Vortaro.
5) Alno: Genro de planto, Alnus japonica.
6) Hie: Monto situanta norde de Kioto, sur kiu staras fama templo de la budaismo.
7) Gion: Fama ŝintoisma templo en Kioto, kiu havas jarfeston, tre faman tra la lando pro la trastrata procesio de bele garnitaj festoĉaroj, kies tegmento portas longan halebardon.
8) Makuzu: Kampo apud Kioto tre ofte kantita de klasikaj utaistoj kaj hajkistoj.
9) Amitabo: Unu el la bodisatvoj, kaj samtempe recita vorto por kelkaj sektoj de la budaismo, kiel 'Amen' ĉe la kristanoj. Amitabistoj tiel nomataj faras unu sekton, en kiu ili kredas ke ili povas iri al Sukavato, budaista paradizo, se ili persistas en ties recitado kun la pura kredo al Budao.

Trad. MIYAMOTO M.

Enciklopedieto de Japanaj Aferoj (1)

de T. Mikami
kun fotoj de A. Ise

Antaŭparolo

Tiu ĉi enciklopedieto estas sufiĉe kaprica, unue, ĉar en ĝi la kapvortoj ne aperas laŭ la alfabeta ordo kaj due, ĉar oni ne scias kiam ĝi venos al la fino

*

ŜINTO-O: Laŭvorte *Dia Vojo*. La indiĝena kulto de japana popolo, konsistanta en la pi-riverencado al *kami*. Tiu vorto *kami*, tradukata laŭ la moderna interpreto per "dio" aŭ "Dio", estas origine la honora vorto, signifanta "alta(j)", por ĉiuj sanktaj spiritoj aŭ diigitaj estaĵoj, adorataj pro ties respektivaj virtoj kaj povoj. De la plej malnova antikveco oni vidis *kami* en la naturobjektoj: la suno, luno, montoj, riveroj, arboj, rokoj, same kiel en la naturfenomenoj: ne nur la vento, pluvo, tondro ktp, sed ankaŭ fekundeco, produktemo, elkreskado ktp, kaj nomis ĉiun el ili *kami*. Tiel same, oni nomis *kami* ankaŭ la mitologiajn diojn (ekz. la Sun-Diino) kaj mitologiajn homojn de artoj kaj metioj, la spiritojn de la prapatroj, naciaj herooj kaj virtaj homoj, kiuj



La torijo de la Meizi-sanktejo, Tokio; dediĉita al la spirito de la imperiestro Meizi

kontribuis al civilizo, kulturo kaj bonstatigo de la kunhomoj, aŭ mortis pro la patrujo aŭ pli malgranda komunumo. Ankaŭ la spiritojn de kompatindaj viktimoj, martiroj kaj eĉ de bestoj k. a. En kelkaj okazoj *kami* estas malfacile distingebla de la spiritoj de animismo. Sed ankaŭ estas fakto, ke en moderna ŝintoo, la *kami*-koncepto estas rafinita, kaj hodiaŭ implicas la ideojn de justeco, egaleco kaj paco.

Ĝenerale parolante, ŝintoo estas karakterize komunuma kun la *jaŝiro*-j (sanktejoj) kiel la kult-centro. La jaŝiroj povas esti ŝtataj, provincaj, regionaj, urbaj, vilaĝaj ktp, depende de la *kami*, kiu(j) estas apoteozita(j) en ili. Kaj ili havas simbolismajn ritojn, ceremoniojn kaj festojn.

Por "ŝintoo" oni povas prooportune uzi la formon: *ŝintoismo*. Sed bone notu, ke ĝi diferencas de ĉiuj ismoj de religio (kiel budaismo, kristanismo, mahometanismo ktp) per tio, ke ĝi ne havas la fondinton, nek sanktajn librojn (kiel la sutroj, biblio, korano ktp), nek eĉ "solan Dion" kiel unikan adorobjekton, nek do bezonas fari prozelitisman agadon. Baza kredaro de la primitiva ŝintoo, kiu estas kaj morala kaj religia, evoluis kun la folkloroj kaj mitoj buŝe transdonitaj generacion post generacio kaj, post la enkonduko de la skribsistemo, dokumentitaj en la "antikvaj kronikoj" (kelkaj libroj) de Japanujo. Ŝintoo esence estas idilie-paca religio kiel la komunuma,

La torijo de la Jaŝiro Katahara, urba de Kameoka. Ĝi portas ŝnuron kun pendantaj ziazag-paperpecoj. Tiu ŝnuro nomiĝas "ŝimenaŭa" (sankta ŝnuro) kaj simbolisme indikas sanktan lokon, kie *kami* estas apoteozita. Ĝi havas ankaŭ ekzorcan signifon.

morala bazo en la spirita vivo de japanoj. Se iuj konsideras ĝin asocita kun japana militarismo, ili ne eraras nur en tia senco, ke la asocio estis portempe kaŭzita de la centraliza kaj mobiliza manovrado de la japanaj registaroj, kiuj dum la militaj jaroj utiligis ŝintoon por flamigi la torĉon de patriotismo kaj heroismo en la koro de la popolo ĝenerale.

★ JAŜIR-O: Ŝintoa sanktejo. Vd: ŜINTOO.

★ TORIJ-O: Tipa enirpordego de jaŝiro, konsistanta el la kaptrabo metita horizontale sur du fostoj kaj la subtrabo, kiu kuntenas la fostojn. Ĝi estas ligna, ŝtona, fera k. a. Vd: bildoj.

Triunuoj:
Tutmonda Reto de Lumo kaj Bona Volo

Celo de la Triunuoj

La starigo de ĝustaj interhomaj rilatoj estas la ĉefa celo spirita de nia Tempo. La Triunuaro klopodas helpi la establon de korektaj homaj rilatoj unuigante virojn kaj virinojn de bona volo sen konsidero al nacieco, raso aŭ religia kredo en plej intima rilato mensa kaj spirita por formi tiel Reton de Lumo kaj Bona Volo ĉirkaŭ la mondo. La mensopovo povas ŝanĝi la nun ekzistantajn kondiĉojn. Laŭ tio, ke la Homaro unuiĝas mense kaj spirite, kreiĝos pli bonaj rilatoj en la ekstera mondo de agoj kaj rezultoj.

La realo pri la fakto de la pensopovo

Ĉiuj scias, per la modernaj sciencaj eltrovoj, ke ekzistas en la etero nevideblaj komuniklinioj — vasta reto de energiokurentoj — kiuj ekzemple en la televido servas kiel komunikkanaloj inter la homoj. Tiu ĉi fakto evidentiĝas ankaŭ en la radio, radaro kaj interago ĉe la telepatikomunikoj; interago pruvita per la sciencaj eltrovoj samtempe faritaj en diversaj partoj de l' mondo. Per la reala fakto pri la ekzistado de ĉi tiuj pensofluoj la homoj povas uzi tiajn kanalojn por mense unuiĝi kun la aliaj homoj. Tiel ĉiu Mondservanto, sen konsidero al sia laborkampo, povas harmoniiĝi kun la forto kaj inspiro de la grupo kaj atingi intuician komprenon pri la problemoj de la Homaro. Tiuj ĉi kanaloj devas resti malfermitaj por la libera cirkulado de la iluminiĝo kaj kompreno, tio estas: de la Lum- kaj amenergioj. Estas per la unuiĝo aŭ kunligo de personoj je potriaj grupoj (kaj la mult-

Preparantoj de Pli Bona Mondo

Eminentaj spiritistaj esperantistoj en Brazilo: en la centro, la klera kaj konscienca historiverkisto *Zeus Wantuil*, dumviva membro de U. E. A.; dekstre *Francisko Cândido Xavier*, fervora propagandisto de Esperanto, membro de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, fama mediumo, kiu jam skribis pli ol 60 altvalorajn librojn, verkitajn de superaj Spiritoj, vivintaj en diversaj epokoj sur la Tero. El tiuj libroj du jam aperis en Esperanto, nome "Antaŭ du mil jaroj..." kaj "Nia Hejmo". Maldekstre la juna medicinisto D-ro *Waldo Vieira*, mediumo tiel altnivela kiel F. C. X. kaj ankaŭ membro de Kultura Kooperativo de Esperantistoj.



jara sperto pruvis ke ĉi tiu estas la nombro plej taŭga) ke oni povas krei ĉi tiun Reton de Lumo kaj Bonvolo.

Kiel fari la laboron

La laboro de ĉiu Triunuo estas simpla. Ĉiutage la membroj devas sidiĝi dum momento, trankvile kaj silente, kaj mense unuiĝi kun la aliaj membroj de sia Triunuo, aŭ Triunuoj. Tiam ili alvokas la lum- kaj Bonvolenergiojn kaj mensvidas ĉi tiujn energiojn kvazaŭ estus cirkulantaj tra la tri fokusaj punktoj de sia Triunuo, kaj elverŝantaj poste — tra la Triunuaroreto kiu tegas la Mondon — en la korojn kaj mensojn de la homoj ĉie en la mondo. Samtempe ili ripetas la Grandan Alvokon, kunhelp ante tiamaniere al la kreado de kanalo por disverŝi la Lum- kaj amenergiojn en la Korpon de la Homaro.

La Granda Alvoko

El la punkto de Lumo en la Menso de Dio,
Ke alfluu Lumo en la mensojn de la homoj
Ke la Lumo subiru en la Teron.

El la punkto de Amo en la Koro de Dio,
Ke alfluu amo en la korojn de la homoj
Ke Kristo revenu en la Teron.

El la Centro kie la Volo de Dio estas konata
Ke la celo gvidu la etajn volojn de la homoj
La celo kiun la Majstro konas kaj servas.

El la Centro kiun ni nomas la raso de la homoj
Ke oni realigu la planon de Amo kaj Lumo
Kaj sigelu la pordon kie malbono loĝas.

Ke la Lumo, La Amo kaj la Povo restarigu la Planon en la Tero.

Respondeco de ĉiu membro

Ĉiutage la membroj de la Triunuoj ĉie en la mondo, image vidas la Reton kiun ili partoprenas. Se okaze de malsano aŭ troa laboro, oni interrompas tiun kunhelpadon, ĝi daŭras per la ceteraj membroj de la Triunuo, — la laboro de la du ceteraj membroj de ĉi tiu Triunuo povas subteni la agadon dum kelke da tempo. Tamen tio estus difinita forperdo ĉar la aktiva pensokontribuo de ĉiu membro estas fundamenta bazo pri la tuta ekzistado de la Reto mem. La ĉiutaga partoprenado en la laboro de la Triunuaro estas ege grava.

Ĉiu membro prenas sur sin la daŭran respondecon resti en kontakto per la penso, persona rilato aŭ letero, kun siaj kunlaborantoj kaj subteni sian triunuon vigla kaj aktiva.

Ĝis nun ekzistas Triunuoj en SESDEKSEP landoj.

Esperantistaj interesitoj bonvolu peti aliĝon kaj pliajn informojn ĉe:

Nicolás López Escartín
Fdo. El Católico, 16,6 izqda.
ZARAGOZA (Hispanio)

"OOMOTO" — Gazeto por Mondfamilio kaj Mondfederacio

Ĉu la koro estas pumpilo?

S-ro Katuzo Nisi
(Foto en 1957: 73-jara)

D-ro Tutimoto, la aŭtoro, finis la Medicinan Fakultaton de Tokia Universitato en 1928 kaj estas la ĉefo de la Tutimoto-Hospitalo en Hiroŝima. Li prezentas en tiu ĉi artikolo la teorion de la sanga cirkulado, kiun iam publikigis s-ro Katuzo Nisi.

S-ro Nisi (1883-1959) studis en la Columbia-Universitato, Usono; laboris kiel inĝeniero en japanaj minejoj kaj partoprenis en la konstruado de la Tokia subtera tramvojo; sed estas plej fame konata kiel la iniciatinto de la *Nisi-Saniga Metodo*, bazita sur lia sangocirkula teorio. Oni povas diri, ke s-ro Nisi dediĉis sian vivon por la sanigo de homoj. Li uzadis sian propran korpon por sennombraj medicinaj eksperimentoj pri ĉiuj infektmalsanoj, escepte lepron kaj sifilison. La entuziasma sindediĉo por lia humanista vivcelo iris ĝis tia ekstremo, ke, por solvi la rasan problemon laŭ sia maniero, li celis blankigi la haŭton de la negroj kaj eksperimente uzadis sian korpon englutante medikamentojn, kiujn li faris el arseno, sulfuro, okzala acido, diatoma tero ktp, kio tamen pruviĝis fatala kaj li fine perdis sian vivon.

Nia redakcio kaj la tradukinto neniel estas kompetentaj en medicinaj aferoj kaj esprimoj, sed volonte akceptis la peton de d-ro Tutimoto por prezenti al la mondo la sangocirkulan teorion de tiu elstara japana humanisto, kiu dediĉis sian vivon por la sanigo de la homaro. Red.

Ĉu la koro funkcias kiel pumpilo, kiel asertis William Hervey?* Ĉu ĝi havas propran forton por elpremi kaj cirkuligi la sangon per kuntiriĝo? Pri tio, mi timas, ke nia cerbo jam estas tro malmoliĝinta por dubi ion. Ni ankoraŭ bezonas multe esplori la funkcion de la koro kaj sangangia sistemo; ni devas fari fizikan observadon en pli vasta kaj profunda amplekso. Alie, ni kuracistoj ripetos la samajn erarojn, kiujn ni senscie faris en la pasinteco: akceli la vivon perdi, anstataŭ savi ĝin, al multaj kormalsanuloj.

Oni havas multajn kazojn, en kiuj la paciento formortas nelonge post kiam li ricevis la injekton de korfortigaĵoj, kia ekz. vitakamforo. En tiaj kazoj oni ĝenerale pensas, ke eĉ la apliko de

* Angla kuracisto kaj anatomiisto (1578–1657)

korfortigaĵo ne savis lian vivon. Sed ĉu oni iam ekdubis la kaŭzon de lia morto, kaj demandis al si, ĉu ĝuste la apliko de korfortigaĵo akcelis lian morton? Necesas, ke ni havu la scienculan okulon, kian havis Isaac Newton, kiu trovis graviton en la falinta pomo. Antaŭ la mortinto, necesas, ke ni havu iom da entuziasmo por esplori la veran kaŭzon de lia morto.

Ĝenerale, la medicinistoj kaj biologoj blinde akceptas la teorion, ke la koro funkcias kiel pumpilo.

Sed imagu ke ĉi tie estas grava kormalsanulo de la lasta fazo: li montras ĉianozon ĉe la lipoj kaj kvar membroj, kaj la kapilaraj sangotuboj (kies nombro estas trimil okcent milionoj eĉ en la kadro de la kvar membroj) estas fermitaj. Imagu, ke al li oni injektas korfortigaĵon, kaj vidu, kio okazos al li. Ĝin ni devas ankoraŭ studi multe kaj serioze!

Pro la injekto okazas, ke la stimulita sangofluo el la koro estas blokata ĉe la kapilaraj sangotuboj, kaj plie, la kresko de la sangoflua premo je ĉiu pulso densigas la sangon ĉe la blokata regiono, dilatante la diametron de la arterioj. Se la arterioj estas ordaj, t.e. sen ia patologia ŝanĝo je arteriosklerozo, ili estas sufiĉe elastaj por povi elteni la kreskon de tia premo kaj ne rompiĝas facile. Sed se la muroj de la arterioj estas ŝtale malmolaj, okazas la akvo-martela fenomeno pro la densiĝo de la sango. (Tiu reataka forto estas sufiĉe granda, ĉar la kresko de flua rapido je 1 cm po sekundo kreskigas la atmosferan premon de 0,14.) Tamen, ordinare, la vazodilata premo estas pli forta ol la densiga premo. (Per mia detala enketo pri diversaj aĝ-grupoj mi trovis, ke la dilata premo, ĉe ĉiuj post-tridekjaraj aĝuloj, estas pli ol 1,252-obla de la premo de la sango fluanta ĵus el la koro.) La dilataj premondoj ne povas iri ĝis la periferiaj kapilaroj kaj reiras en la direkto de la koro. La koro, siavice, per kuntiriĝo volas elsendi la sangon, kies ondoj fariĝas neevitebla forto de reatako (rigardebla kiel speco de la akvo-martela fenomeno) kaj povas atingi la maldekstran korventriklon eĉ kiam la duonlunaj klapoj ne estas fermitaj. La ciklo de tia ondmovo, dum ĝi estas ripetata, iom post iom perdas sian forton, kaŭzante, fine, la ekhaltiĝon de la koro. Tion ni povas pruvi ankaŭ per hidraŭlika eksperimento. Plie, ni devas enkalkuli ankaŭ la faz-diferencon kiun kaŭzas la sango fluanta el la koro en la arteriojn ĝuste kiam la arterioj devas kuntiriĝi; tie estiĝas reataka forto, kiu reiras al la koro kaj donas ŝokon. Tiuj ĉi reatakaj fortoj estas la kaŭzoj de la granda mortokvanto de la kormalsanuloj, kiuj ricevis la injekton de korfortigaĵoj. Se la injekto de korfortigaĵoj estus ago de ia murdo al gravaj kormalsanuloj, tio devus esti tro grava problemo por esti ignorata.

Mi kiel kuracisto multe luktis kun tiu ĉi problemo. Sed kiam mi studis la teorion de Nisi pri la sanga cirkulado, publikigita antaŭ pli ol tridek jaroj, mi trovis radion de espero por la solvo.

Hodiaŭ, ankoraŭ multaj medicinistoj kaj klinikistoj ne volas klini sian orelon al la teorio de Nisi, ĉefe pro tio, ke li ne estis legitima medicinisto, sed ĉar la praktika aplikado de lia teorio ĉe mia hospitalo alportis nemalmultajn mirindajn rezultojn, kiajn la moderna medicino eĉ ne povas imagi, mi sentas tion mia devo, prezenti la Nisi-teorion al la mondo kaj averti kontraŭ la danĝereco de la apliko de korfortigaĵoj al gravaj kormalsanuloj.

Nisi forneis la kormotorecon por sanga cirkulado kaj pruvis ke la

motoro kuŝas en la kapilara aktiveco de la sangotuboj. Pri tio li prezentis 52 punktojn, el kiuj mi citos plurajn resume:

1) Atentu la naturan fenomenon ĉe homoj kaj bestoj, ke ili perdas sian apetiton kiam ili malsaniĝis aŭ vundiĝis.

2) Se homo fastas, liaj vejnoj plivigligas sian kuntiriĝan aktivecon por sendi al la koro la malpuran sangon kun forĵetindaĵoj, kiel karbona dioksido, histamino, kolino ktp. Tiam ĉiufoje estiĝas vakuo en la junto de la vejnoj kaj kapilaraj sangotuboj, kaj tiu vakuo kaŭzas la fenomenon de kapilareco: sorbi la sangon el la arterioj por sendi ĝin en la vejnojn. Jen kio estas la motoro por sanga cirkulado.

3) Ĉiu ĉelo vivas kaj aŭtomate postulas al si puran sangon laŭ sia bezono.

4) La ĉeloj havas aktivecon por proprumi al si nutroelementojn el la sango. Se la sango portas ian venenon aŭ bakteriojn, ili kuntiras la kapilarojn por rifuzi akcepti ilin. En tiu okazo, la pormomenta reguligo de sanga cirkulado plenumiĝas per la funkcio de la arteri-vejna ŝunto (*glomo* laŭ la termino de Nisi) tamen, fine la perdo de apetito (ĉe homo) estas neevitebla.

5) Kiam la ĉeloj aŭtomate rifuzas asimili al si venenitan sangon per kuntiro de la kapilaroj, tiam la kapilara aktiveco nature fariĝas malforta, same kiel la pulsado. Tio pruvas, ke la sango cirkulas ja pro la kapilara motoreco, kaj ne, ke la koro havas propran forton por distribui kaj liveri la sangon al la ĉeloj, sendepende de ties bezonoj.

6) Oni demandu al si, per kio okazas la sanga cirkulado en tiuj vivantaj estaĵoj, kiuj ne havas la koron. La senkorulaj estaĵoj havas la fermitan sangangian sistemon: ili ne havas la koron sed havas la kapilarojn. Ĉu oni povus ekspliki la sangan cirkuladon ekz. en la lumbriko, sen rekoni la motorecon de la kapilaraj sangovazoj?

7) La malaltaj estaĵoj de la animala regno, kiuj havas la malfermitan sangangian sistemon por sanga cirkulado, principe ne havas la kapilarojn. La sango kiu venas el la malfermitaj ekstremoj de la arterioj eniras en la hemokulon (*haemocoele*), trempas la histojn senpere kaj eniras la vejnojn por reiri al la koro. Tio signifas, ke la ĉelaro de la histoj aŭtomate sorbas la sangon laŭ sia bezono.

8) Kiel oni eksplikus la eblecon de sanga cirkulado en la gravedulino kaj la feto? Se la koro de la virino estis malforta antaŭ la gravediĝo, ĝi fariĝos ĉiam pli malforta post la gravediĝo, kaj la ŝarĝo fariĝos tro granda en la okazo de dunaskotoj aŭ trinaskotoj.

9) Oni kredas, ke la kuntira forto de la maldekstra korventriklo (kiu estas pugno-granda, nur kvarono de la koro) elpuŝas la sangon (kies glueco estas 4,5-obla de tiu de la akvo) kaj en 11 sekundoj trafluigas ĝin tra la kelkmil milionoj da kapilaraj sangotuboj, kies meza diametro estas 5.5 mikronoj. Per kia hidraŭlika ekspliko oni povus pruvi tion?

10) La aŭtopsio montras, ke la maldekstra korventriklo de la mortintoj post kronikaj malsanoj aŭ akutaj infektmalsanoj, kiel tifo abdomena, influenco, difterio ktp, estas dilatiĝinta kaj plenigita de sango; sed tiu de la subitaj mortintoj pro apopleksio aŭ intesta obstrukco estas kuntiriĝinta kaj malplena de sango. Kiel oni eksplikus tiun fenomenon?

11) La koro havas aŭtomatismon. Eĉ se ĝi estas fortranĉita, ĝi povas sub certaj kondiĉoj daŭrigi sian funkcion de kuntiriĝo kaj dilatiĝo por kelkaj horoj.

Se la arterioj estas tranĉitaj la sango elŝpruciĝas. Tiun ĉi fenomenon ni ne bezonas ekspliki per la aŭtomatismo de la koro, sed per la inerteco, pro kiu ekz. la tramo daŭrigas sian kuradon eĉ post kiam la elektro estas elŝaltita.

12) La koro de la feto vidigas la trajtojn de S-formo en la 26-a tago post la koncipiĝo, kaj apenaŭ sian plenan formon en la sesa semajno. Ni ne povas konsideri, ke tiu koro de la feto funkcias kiel la motoro respondeca por la sanga cirkulado de la feto. La sanga cirkulado en la feto okazas pro la kapilareco kaŭzata de la vejnoj per kuntiriĝo kaj de la arterioj per dilatiĝo.

13) La arterioj laŭ sia strukturo kaj laŭ la konsisto de sia nervaro havas esence la vazodilatan funkcion.

14) La vejnoj laŭ sia strukturo kaj laŭ la konsisto de sia nervaro havas esence la vazokuntiran funkcion.

15) Se ni observas sub mikroskopo la kapilarojn de la rana lango aŭ naĝmembrano, ni konstatas, ke la sangoglobetoj diskuras zigzage tien kaj reen. Tiu konstato ne povas supozigi al ni, ke la sango cirkulas sub premo de la koro.

16) Se la koro estus analoga al pumpilo, ni povas diri, ke la dupinta klapo troviĝanta inter la maldekstra koraŭriklo kaj la maldekstra korventriklo ekzistas nur por malhelpi ilian funkcion. Sed ĉar la koro ne estas pumpilo, sed sangujo por trakorpa laŭbezona distribuo, la dupinta klapo plej taŭgas por tio: la kuntiriĝo de la maldekstra korventriklo elsendas la sangon en la aorton, kies dilatiĝo fermigas la duonlunajn klapojn por malebligi la sangan refluon el la aorto kaj samtempe estigas en la maldekstra korventriklo vakuon, pro kies altirforto ĝi ensorbas la sangon el la maldekstra koraŭriklo — tra la dupinta klapo, kiu estas la plej taŭga por tio. La dupinta klapo estas por altiro de la fluo, dum la tripinta klapo estas taŭga por puŝo. (Se troviĝas almenaŭ iom da pumpila funkcio en la koro, ni povas diri, ke ĝi estas en la dekstra korventriklo.)

17) La arterietoj branĉiĝas de la arterio ne kurbe sed orte. Tio pli pruvas, ke la kapilaroj altiras la sangon, ol ke la koro mem pumpile elpremas la sangon.

18) La portvejno portas la sangon de la digestorganoj al la hepato. Kio estas la motoro por la portvejna funkcio?

19) La fajrobrigada pumpilo konsistas el enspira tubo, motoro kaj elspira tubo. La tolmaterialo, el kiu la enspira tubo estas farita, estas pli dika kaj fortika ol tiu de la elspira tubo, ĉar la enspira tubo bezonas elteni la fortan premon, kiun kaŭzas la interna vakuo. Nu, se la koro estus analoga al pumpilo, kiel oni eksplikus la fakton, ke la vejnoj (enspiraj tuboj) estas malpli dikaj, ke la muro de la maldekstra korventriklo estas 3-4-oble pli dika ol tiu de la dekstra? Ni povas klarigi ĝin pli racie kaj logike: la arterio estas enspira tubo kaj la vejno estas elspira tubo.

20) Nenie oni trovus tian pumpilon, kies elspira tubo dissplitiĝas ĉe la pinto en fajnajn branĉetojn kaj kies enspira tubo estas larĝigita ĉe la ekstremo.

21) La dinamika korolario de la kor-motoreco estus, ke ĉiu artika movo de la manoj, piedoj kaj aliaj membroj devas kreskigi la batadon de la maldekstra korventriklo; sed tia fenomeno efektive ne okazas.

22) La kornervaro, konsiderata movanta la koron, estas nutrata de la koronariaj arterioj, sed la scienca kalkulo pruvas, ke ili nutras sole nur la kornervaron: al ili mankas la kalorioj por funkciigo de la koro kaj cirkuligo de la sango. Sekve, la koro ne havas propran

forton por sanga cirkulado.

23) Kiel jam dirite en 2), la pro-vakua aktiveco de la kelkmil milionoj da kapilaroj sorbas la sangon el la arterioj, kiam ĉi tiuj kuntiriĝas. Poste, ili dilat iĝante sorbas la sangon el la maldekstra korventriklo, kiam ĉi tiu kuntiriĝas. Poste, ĝi dilatiĝante sorbas la sangon el la maldekstra koraŭriklo. Tiel okazas batado de la koro kaj pulsado de la arterioj. Tia fenomeno ne povas okazi se la koro estas pumpilo.

24) Kiam la ĉeloj ĉirkaŭ la kapilaroj ne volas sorbi nutroelementojn, ili kuntiriĝante ellasas venenajn elementojn (kiel dirite en 4) tiel, ke la diametro de la kapilaraj sangotuboj plimaldikiĝas. Sed tiam malfermiĝas portempe la arteri-vejna ŝunto por cirkuligi la sangon el la arterioj rekte en la vejnojn. Se foje okazas, ke la paciento injektita per korfortigaĵo tuj ne formortis, tio estas nur dank' al la malfermita arteri-vejna ŝunto, tra kiu la sango fluas anstataŭ tra la kapilaraj sangotuboj. Ĉar en tiu okazo ne estas facile, ke la "akvo-martela" fenomeno okazu.

25) La moderna medicino havas unuaniman opinion pri la dua kor-sono, sed troviĝas pli ol kvardek malsamaj opinioj pri la unua kor-sono. La fakto estas, ke la paliĝo aŭ ruĝiĝo de la vizaĝo pro timo aŭ honto ktp. okazas pro la efiko de la spirito je la kapilaraj sangotuboj kaj la arteri vejna ŝunto. Nur per la kapilara motoreco por sanga cirkulado ni povas kompreni pri tio, kial la unua kor-sono estas tiel varia kaj kompleksa depende de la individuaj personoj.

26) La dekstra koraŭriklo kaj la dekstra korventriklo situas inter la kavaj vejnoj (supra kaj suba) kaj la pulmaj arterioj (t. e. la pulmaj vejnoj, laŭ Nisi): la du unuaj havas la similan strukturon kiel tiu de la du lastaj; ili havas proprecon por maldilatiĝo kaj estas rigardeblaj kiel parto de la vejna sistemo.

27) La maldekstra koraŭriklo kaj la maldekstra korventriklo situas inter la pulmaj vejnoj (t. e. la pulmaj arterioj, laŭ Nisi) kaj la aorto: ili, precipe la maldekstra korventriklo, havas la similan sangangian strukturon kiel tiu de la pulmaj vejnoj kaj la aorto (la muroj estas dikaj); ili havas proprecon por dilatiĝo kaj estas rigardeblaj kiel parto de la arteria sistemo.

28) La vaga nervaro akcelas la funkcion de diversaj organoj kaj la simpatika nervaro kontraŭagas ĝin. La propra funkcio de la vaga nervaro estas dilati la maldekstran korventriklon kaj la arteriojn; kaj tiu de la simpatika nervaro estas kontraŭagi ĝin. Laŭ la ĝisnuna teorio, oni konsideris, ke el ĉiuj organoj la koro estas la escepto, kies funkcion akcelas la simpatika nervaro kaj malakcelas la vaga nervaro. Tio estas eraro.

Mi jam citis 28 punktojn, per kiuj Nisi forneas la pumpil-funkcion de la koro.

Plie, Nisi eksperimente pruvis, ke la kapilara tubo kun la diametro de 5,41 mikronoj kapablas levi la akvon ĝis la alto de 20 metroj, kio ekvivalentas al la hidrarga kolono de 147,2-milimetra alteco. La diametro de la kapilara sangotubo estas 2-mikrona ĉe la maksimuma kuntiriĝo kaj 9-mikrona ĉe la maksimuma ekspansio; t. e. la meznombra diametro estas 5,5 mikronoj, kiu cifero estas proksimume egala kun la eksperimenta rezulto de Nisi, supre-dirita. Tial, se la sorba forto de la kapilaroj estas nulo, Nisi konkludas, la sango bezonas por cirkulado alian premforton, kiu estas ekvivalenta al la hidrarga kolono de 147 milimetroj. Sed la fakto estas, ke la sangopremo en la kapilaroj estas 15 ĝis

40 mm — tute ne sufiĉa por la bezonata forto. Sekve, la motoro por sanga cirkulado kuŝas en la altir-forto de la kapilaraj sangotuboj. La kvanto de la sango, kiu elfluas el la koro po minuto estas ĉ. 4 litroj. Por ke la 4 litroj da sango trafluu la kapilarojn sufiĉas la altirforto de ĉ. dumil cent milionoj el ĉiuj kvinmil cent milionoj da kapilaraj sangotuboj.

Se ni supozas, ke la meznombra diametro de la kapilara sangotubo estas 0,006 mm, la sekcareo estas: $A = 0{,}006^2 \times 0{,}7854$. Nun ni supozu la longon de la kapilara sangotubo: $l = 1$ mm, kiel la meza valoro de 1,66 ~ 0,67 mm; la tutan nombron: $n = 2\ 100\ 000\ 000$ kaj la nombron de la pulsoj: $p = 72/\text{min}$. Tiam ni havas la tutan kvanton da sango altirata per la 72-foja kapilareco po minuto: $Q = A \cdot l \cdot n \cdot p / 1\ 000\ 000 = 4{,}275$ litroj. Jen la cifero preskaŭ egalvalora al tiu de la sangokvanto supozata elsendata el la koro ĉiuminute. Tio pruvas, ke la volumeno de la maldekstra korventriklo egalas al tiu sumita de la kapilaraj sangotuboj.

Resumo

Kvinmil cent milionoj ($51 \cdot 10^8$) da kapilaraj sangotuboj liveras nutroelementojn al kvarcent trilionoj ($4 \cdot 10^{14}$) da ĉeloj tra la tuta korpo (t.e. po okdekmil ĉeloj por ĉiu sangotubo). Ĉiu ĉelo havas vivon, kiu bezonas nutraĵon — pro "malsato". Ĝi sorbas al si nutraĵon tra la kluzetoj de la kapilaraj sangotuboj kaj ellasas forĵetindajn elementojn, kiel karbona dioksido, histamino, kolino ktp. Kiam parto de tiuj forĵetindaĵoj tuŝas la arterietojn, ĉi tiuj tremkuntiriĝas kvazaŭ timigite, kiam la sango fluas en la vejnojn; kiam en la anastomozo inter la vejnetoj kaj la kapilaroj estiĝas vakuo (en la flanko de la kapilaroj), ĝi kaŭzas la kapilarecon, kaj tiu kapilareco sorbas la sangon el la arterioj kaj tiel la sango fluas el la koro.

La sango, kiun la kapilaraj sangotuboj sendis en la vejnetojn, senĉese fluas — pro la vazokuntiriĝado kaj la vejna klapo malhelpanta la refluon — en la kavajn vejnojn supran kaj suban, kaj eniras la dekstran koraŭriklon.

Kiam la sango eniras la dekstran koraŭriklon, ĉi tiu tremkuntiriĝas kvazaŭ timigite, kiam la sango eniras en la dekstran korventriklon. La kuntiriĝadon reguligas la nodo *sinu-atrialis* kaj la nodo *atrioventricularis*.

Laŭ la Gärtner-fenomeno, laŭmezure kiel ni levas la brakojn alte, kreskas la premo en la interno de la dekstra koraŭriklo kaj tiel kreskas la sangorefluo en la vejnojn. Tio estas facile komprenebla, same kiel lia aserto, ke la ritmaj impulsoj komenciĝas de la supra parto de la dekstra koraŭriklo, kie troviĝas la buŝo de la supra kava vejno. Plie, la fakto, ke la nodo *sinu-atrialis* kaj la nodo *atrioventricularis* troviĝas en la dekstra koraŭriklo, pruvas, ke la dekstra koraŭriklo mem estas la grava regiono por la pumpila (kuntiriĝa) aktivado de la tuta vejna sistemo. El tio sekvas, ke la kuntiriĝa funkcio estas la propreco de la dekstra parto de la koro (26), kaj la dilatiĝa funkcio estas la propreco de la maldekstra parto de la koro (27), kaj la sango cirkulas per la altirforto de la kapilaraj sangotuboj. Jen la kerno de la Nisi-teorio pri la sanga cirkulado.

Supozante, ke la koro estas pumpilo por la sanga cirkulado, la itala fizikisto Giovanni Alfonse Boreley asertis en sia "*De motu animalium*" (Movado en la animaloj, 1681), la forto de la koro estas egalvalora al la premo de 80 000 funtoj

Alvoko pri la Tria Literatura Konkurso por la Premio "Comella-Bassols"

Oni donacos 2.000 pesetojn por la plej bona gaja rakonto en Esperanto.

Ĝeneralaj reguloj: 1 — La konkursaĵoj havu la amplekson de po 2000-3000 vortoj.
2 — La konkursaĵoj nepre estu maŝinskribitaj kaj oni sendu 4 ekzemplerojn.
3 — Oni skribu sur ĉiu konkursaĵo pseŭdonimon por kaŝi la identecon de la aŭtoro, kaj — en aparta koverto — sian nomon kaj adreson kune kun la pseŭdonimo.
4 — La Juĝanta Komisiono, laŭ deziro de S-ro Jacin Comella, (kreinto de la Premio) konsistas el eksterlandaj samideanoj, membroj de UEA, kun katalunaj juĝantoj.
5 — La konkursa kotizo, por unu aŭ pluraj rakontoj, estas 10 pesetoj por Hispanujo, kaj por eksterlando 4 steloj aŭ 3 respondkuponoj. Por landoj kie ne estas eble sendi la kotizon, la partopreno estas senpaga.
6 — Kiam publikiĝos la Verdikto, samtempe estos anoncita la koncerna Juĝantaro.
7 — La limdato por la ricevo de konkursaĵoj estas la 31 de Aŭgusto, 1961. Oni sendu ĉion laŭ la jena rekomendo:
POR LA KONKURSO "COMELLA-BASSOLS", S-ro. Francesc Vilá — Sekretario
INSTITUTO DE ESPERANTO, Montcada, 12, BARCELONA(3), Hispanujo.

'Japana Semajno' en Duesseldorf

"Japana Semajno" okazos fine de junio en la Okcident-Germana urbo Duesseldorf sub la aŭspicio de la Germana-Japana Asocio.

Dum tiu semajno, prof. Harro Siegel de Brunswick prelegos pri la japana marioneta teatro kaj oni montros japanajn marionetojn de la Munkena Teatra Muzeo.

Prof. Diehm de la Sporta Akademio ĉe Kolonjo prelegos pri japanaj sportoj kaj oni faros ĵudo-prezentadon de kelkaj japanaj ĵudistoj.

Ankaŭ japanaj filmoj estos prezentitaj al la publiko kaj la japana arto de florarangô estos klarigita ĉe florekspoziciejo.

(90 usonaj tunoj). Aliflanke, la skota kuracisto James Keel en sia tezo *"On the Blood Quantity and Muscular Movement in Animals and Mankind"* (Pri la Sangokvanto kaj Muskola Movado en Animaloj kaj Homaro, 1711) kalkulas, ke la forto de la koro estas ne pli granda ol la premo de unu funto. Jen la du ekstremaj konkludoj eltiritaj el la malsamaj hipotezoj.

Nisi pruvis, ke la maldekstra korventriklo, kiu estas nur pugno-granda, ne povas havi la forton egalan al kelkcent ĉevalpovoj, ke la koro ne estas la motoro, sed la sangujo por la sanga cirkulado. La teorio de Harvey estas renversita. Nisi ofertis, ke li estas preta doni la premion de ¥ 1 000 000 al tiu, kiu povas prezenti al li la matematikan kalkulon, kiu pruvus la pumpil-funkcion de la koro.

Kiu komprenis, ke la koro ne estas pumpilo, tiu devas eviti la aplikon de korfortigaĵoj al tiuj gravaj kormalsanuloj, kies *glomo*-j estas preskaŭ aŭ tute difektitaj, ĉar la injekto de korfortigaĵo tiam facile kaŭzas korparalizon.

La Nisi-sistemo de medicina scienco havas diversajn metodojn por fortigi la koron en tiaj okazoj.

Trad. *Dan Rak*

OOMOTO n-ro 249-250 (3-4月号) 昭和36年5月1日発行・購読料一年240円
編集人中村陽宇・京都府亀岡市・株式会社天声社発行・振替京都25757番